

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Monique Arnaud

Jean-Pierre Boulet

Augusto Casquero

Duncan Charters

Renato Corsetti

Mariana Gençeva

Julián Hernández Angulo

Malgosia Komarnicka

Katalin Kováts

Edmond Ludwig

Stefan MacGill

Jean Bosco Malanda

Stano Marček

Piotr Nosek

Johano Petik

Radojica Petrović

Gong Xiaofeng



---

## ENHAVO

---

Julián HERNÁNDEZ ANGULO: <i>Por pli scienca 43<sup>a</sup> ILEI-Konferenco en Kubo</i> .....	3
Renato CORSETTI: <i>Szerdahelyi, Frank kaj Springboard [...] (I.)</i> .....	4
Radojica PETROVIĆ: <i>Esperanta pedagogio por denaskuloj (pri REF)</i> .....	9
Luiza CAROL: <i>Gimnastiko por la elementa lernejo</i> .....	12
<i>Ni kondolencas († K.Wieberdink, † A.Middelkoop, † H.Farukuoye)</i> .....	14
<i>El la landoj kaj sekcioj (BG, CN, FR, CD)</i> .....	16
Augusto CASQUERO: <i>Edukado en Ĉinio</i> .....	18
Stano MARČEK: <i>Esperanto per rekta metodo</i> .....	23
<i>Intervjuo kun Andrzej Pisowicz (Piotr NOSEK)</i> .....	25
Katalin KOVÁTS: <i>Ŝtrumpa truekzerco</i> .....	27
<i>Pliaj motivoj por evoluigo (reago de Johano PETIK)</i> .....	29
<i>ILEI en la 35a Ĝenerala konferenco de UNESKO (M.ARNAUD, J-P.BOULET)</i> .....	31
<i>Okazis "kuba" konferenco! (raporto de Stefan MACGILL pri la Estrarkunsido)</i> .....	32
<i>Kio nova por la ILEI-Konferenco en Kubo? (Duncan CHARTERS)</i> .....	36
<i>Aliĝilo + aliĝkondiĉoj por la ILEI-Konferenco en Kubo</i> .....	39

---

## ESTRARO DE LA LIGO

---

**Prezidanto:** Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

Tel. (+36 1) 349-5207, <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>.

Eksteraj rilatoj, kunordigo, konferenco, regularoj.

**Vicprez.:** Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <[duncan.charters@gmail.com](mailto:duncan.charters@gmail.com)>.

Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

**Sekretario:** Małgosia KOMARNICKA, adreso ĝis 15 junio 2010: E-Centro,

Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio.

<[margareta.ilei.pollando@gmail.com](mailto:margareta.ilei.pollando@gmail.com)>. Sekretariaj taskoj.

**Estrarano pri financoj:** Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando. Tel. (+31)

252 515331, <[persiko@mail.ru](mailto:persiko@mail.ru)>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

**Estrarano:** Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,

<[zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de)>. E-centroj, instrukapbligado, ekzamenoj.

**Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak,

Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>.

Edukprojektoj, informado, terminara komisiono.

**Estrarano:** Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo

Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,

<[julian@esperanto.co.cu](mailto:julian@esperanto.co.cu)>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

---

**Estrara komisiito** por la Konferenco en Kubo: Ana MONTESINOS DE GOMIS,

Britio, <[anamontesinos.esper@btinternet.com](mailto:anamontesinos.esper@btinternet.com)>.

---

## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### **Membroj:**

**Vera Barandovská-Frank**,  
Germanio, Universität Paderborn;  
AIS<sup>2</sup> San Marino

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti**, Italio, Università  
degli Studi di Roma „La Sapienza”;  
AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, LRU,  
Indian Statistical Institute, Kolkata;  
AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Wim Jansen**, Nederlando,  
Universiteit van Amsterdam

**Boris Kolker**, Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iłona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama  
Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Mauro La Torre**, Italio, Università  
degli Studi Roma Tre

**Maria Majerczak**, Pollando, Uniwer-  
sytet Jagielloński w Krakowie

**Geraldo Mattos**, Brazilo, Federacia  
Universitato de Paranao; AdE<sup>1</sup>

**Aleksandr Melnikov**, Rusio,  
Академия Сельскохозяйственного  
Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

**Sekretario: Aida Čižikaitė**, Litovio

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

<sup>2</sup> AIS – Akademio Internacia de la  
Sciencoj, San-Marino

## **POR PLI SCIENCA 43<sup>a</sup> ILEI-KONFERENCO EN KUBO**

Instrui, helpi, esperantistigi, alproksimiĝi, ami estu agoj nemalhaveblaj dum la E-instruproceso. Nur tiel la miraklo, la celo produkti, naski bonajn esperantistojn realiĝos.

Ni esperas ke la venonta ILEI-Konferenco en Kubo estos momento por multe pli mediti pri la rolo de instruantoj kaj instruistoj en la nuntempa movado. Kaj instruantoj, kaj instruistoj interŝanĝu siajn spertojn en rilato kun plej efikaj strategioj, instrumentoj, teknikoj por ke la interesitoj venintaj kaj venontaj al niaj klasĉambroj bone lernu la lingvon kaj esperantistiĝu. Oni vere konsciigu kiom malfacilas la arto instrui kaj pri la granda kompromiso alprenita de tiuj kiuj decidas fariĝi E-instruantoj. Temas pri tre serioza paŝo postulanta senhaltan alproksimiĝon al la esencoj, nuancoj kaj detaloj de la lingvo kaj al ties kulturo kaj historio.

Ni klopodu, ke niaj estontaj konferencoj estu pli kaj pli metiejoj, kies partoprenantoj estu vere aktivaj instruantoj, kien la instruantoj portas plurajn tiklajn demandojn kaj dubojn taŭgajn por ĉiuj kaj kie la landaj sekcioj dividas la jaran atingitaĵojn kaj neatingitaĵojn surbaze de la raportoj faritaj kiel okazis antaŭ kelkaj jaroj. Mi ja memoras kiom multe ili

spronis kaj instigis min fari, aŭskulti la jaran instruagadon de aliaj landoj.

La rilato kun universitatoj de la gastiganta lando pere de la simpozio ja iel valoras, sed ni ne serĉu, nek vidu la scian profilon de niaj konferencoj nur tie. Pli ol tie, la scienco de niaj konferencoj kuŝu sur la vortoj kaj opinioj de la instruantoj, informante kiel ili sukcesis kaj malsukcesis solvi plej diversajn problemojn en siaj respektivaj klasĉambroj, sur la disvastigo de la plej bonaj artikoloj aperintaj en nia oficiala organo IPR dum la jaro ktp. Bezonatas, ke la plimulto el la partoprenantoj konsciiĝu, ke temas pri la pinta scienca renkontiĝo de la E-instruantoj de la jaro.

Oni profitu la fakton, ke ĝi okazos en Amerika lando por ebligi la partoprenon de kelkaj ĉi-regionaj instruantoj kun fruktodonaj rezultoj kaj kun perspektivoj estonte helpi al la evoluo de E-o en la kontinento. Amerikaj instruantoj sendube multe povos kontribui al la sukcesa okazigo de la 43<sup>a</sup> ILEI-Konferenco en Kubo, per siaj instrustiloj kaj instrumanieroj. Ni, kubaj organizantoj, klopodos, ke niaj plej aktivaj kolegoj partoprenu por garantii la estontecon de unu el la ĉefaj celoj de nia movado.

La hotelo Canimao, apud la rivero Canimar survoje al la populara kaj bela kuba strando Varadero, gastigos la konferencanojn; pro tio ni certigas, ke ne mankos kontakto pere de promenado, ekskursoj kaj alispecaj programeroj, kun la bela naturmedio ĉirkaŭanta nin. Ankaŭ ne mankos la varmo kaj gastamo de la kubanoj, kiuj klopodos, ke la partoprenantoj pasigu la plej agrablajn tagojn en sia vivo.



*Julián HERNÁNDEZ ANGULO,*  
estranano de ILEI

## **Szerdahelyi, Frank kaj *Springboard*: kion komunan ili havas?**

*(mallongigita versio)*

de Renato CORSETTI (Italio)

### **1. Enkonduko**

Se ekzistis unu esperantisto, kiu ne interesiĝis pri la lernofaciliga valoro de E-o, tiu estis Zamenhof mem. Sed jam en la komencaj jardekoj de la pasinta jarcento aliaj esperantistoj komencis okupiĝi pri la ideo, ke kono de E-o faciligas la lernadon de lingvoj poste lernotaj. Kaj efektive oni

trovis, ke E-o estas efika por pretigi anglalingvajn infanojn al la posta studo de la franca. Similajn ideojn sekvas la nunaj esperantistoj, fronte de la malfacilo konvinki homojn lerni E-on pro ĝiaj internaj valoroj kaj pro la hom-protekta potencialo, kiun ĝi havas.

Ĉi tiu artikolo pritraktas la ideojn pri la lernofaciliga valoro de E-o en la lastaj 50 jaroj kaj la aplikon de tiuj ideoj.

## 1. Szerdahelyi

Mi renkontis Profesoron István SZERDAHELYI multajn fojojn en la 1970-aj jaroj en la medio de E-aranĝoj, ĝeneralaj aŭ de ILEI. Li estis granda fumanto, kiel mi en tiu periodo, sed ankaŭ granda konversacianto. En unu el tiuj konversacioj la temo estis pri instruado de E-o, kaj li aludis al artikolo, kiun li aperigis en la 1960-aj jaroj en franc-lingva revuo (Szerdahelyi, 1966)<sup>1</sup>. Tiu artikolo aperis poste ankaŭ en E-o (Szerdahelyi, 1970) en la nula prov-numero de IPR.

Szerdahelyi, profunda konanto de la esploroj faritaj en Hungarujo kaj en la tiama Soveta Unio rilate al la problemoj de instruado de la rusa lingvo al hungaroj, en tiuj artikoloj ĝeneraligis la rezultojn de tiuj studoj kaj aplikis ilin al E-o<sup>2</sup>. Tute aparte li rimarkigis, ke eksterordinaran valoron E-o havas kiel ponto-lingvo en la okazo de X = suom-ugra<sup>3</sup> lingvo kaj Y = hindeŭropa lingvo<sup>4</sup>. Fakte li estis komparinta la lernomaterialon de la unua lernojaro de pluraj fremdaj lingvoj kun E-o kaj kun la hungara lingvo en la sinsekvo *hungara - Esperanto - lingvo hindeŭropa* – kaj li estis alveninta al la ĉi-sekvaj procentaĵoj, kiuj montras kiom E-o faciligas la lernadon de unu el la lingvoj franca, angla, germana, rusa, se ili estas instruataj post E-o:

<i>hungara – Esperanto – franca</i>	50%
<i>angla</i>	40%
<i>germana</i>	30%
<i>rusa</i>	25%

---

<sup>1</sup> Fakte tiu artikolo estis traduko de prelego, kiun li estis farinta en E-o la 21-an de julio 1965-a en Graz (AT), okaze de Internacia Studsemajno organizita de ILEI.

<sup>2</sup> Szerdahelyi pritraktas ĉi tiujn studojn kaj ĝenerale la problemaron de instruado de fremdaj lingvoj al hungaroj en Szerdahelyi (1975).

<sup>3</sup> Suom-ugra lingvo estas mia versio de tio, kion en la angla oni nomas *Finno-ugric language* kaj en Esperanto ofte finno-ugra lingvo.

<sup>4</sup> Szerdahelyi uzas la literojn X kaj Y por indiki respektive la gepatran lingvon kaj la fremdan lernendan lingvon. Nuntempe oni preferas paroli pri L1 kaj L2.

Tre pli malcerta estis lia ideo pri la lernofaciliga valoro de E-o inter hind-eŭropaj lingvoj kaj tute aparte inter "proksimaj" hind-eŭropaj lingvoj. Tia lernofaciliga valoro laŭ li ekzistas, sed li asertas tion nur kiel ĝeneralan principon sen iu ajn provo mezuri ĝin aŭ trovi procentaĵojn.

Nature, ĉar li laboris en Hungarujo, li ĉefe atentis la problemojn de nehind-eŭropanoj, kiuj devas lerni lingvon hind-eŭropan. Ĉi tiu, cetere, ŝajnis al li la vera problemo ankaŭ je monda nivelo, ĉar laŭ li en 90 elcentoj de la situacioj, en kiuj oni lernas fremdan lingvon, temas pri hind-eŭropa lingvo (angla, franca, germana, rusa, itala, hispana).

Ĉi tiuj ideoj de Szerdahelyi estis abunde mislegitaj en la E-movado, kie komencis cirkuli opinioj, ke laŭ eksperimento farita en Budapeŝto E-o, ŝparigas 50% de la tempo bezonata por lerni la francan kaj 40% de la tempo bezonata por lerni la anglan, ktp. Ne temas pri eksperimento, sed pri praktika komparo de la lernounuoj en la lernolibroj por la unua jaro de lernado de la fremda lingvo. Kaj tiuj procentaĵoj rilatas nur al lernantoj, kies gepatra lingvo estas la hungara.

Mi ne komprenas, kiel tio povis okazi. Evidente temis pri deziro, kiu gvidis la interpreton. Mi citu nur unu fonton pri tiu misideo pri Szerdahelyi kaj lernofaciliga efiko de E-o. Temas pri Frank (1992:17).

Efektive la ideoj de Szerdahelyi estis pli nuancoriĉaj. Szerdahelyi mem ja gvidis eksperimentojn, eĉ plurnaciajn, sed ili celis esplori multajn faktorojn rilate al la lernado de E-o, ekzemple la lernofacilecon de E-o kaj ne nur ĝian lernofaciligantan valoron. La plej konata estas la kvinlanda eksperimento de ILEI. Vidu pri tio en Sonnabend (1979).

Eksperimentoj pri la lernofaciliga valoro de E-o jes okazis tra la tuta pasinta jarcento, sed kiel ni vidos en la posta sekcio, la rezultoj estas tute malsamaj ol la procentaĵoj prezentitaj de Szerdahelyi por hungarlingvaj infanoj. Ĝenerale oni povas diri, ke oni estas tre malproksima de tiuj procentaĵoj, se entute oni povas havi ciferan rezulton.

## **2. Eksperimentoj laŭ la sinsekvo indikita de Szerdahelyi: L1 – E-o – L2**

Pluraj eksperimentoj estis faritaj ankaŭ pri lernantoj de triaj lingvoj, kies dua lernata lingvo estas E-o.

La unuaj konsideroj pri la lernofaciliga valoro de E-o estas tre antikvaj, en 1908 fare de unu el la unuaj verkistoj en E-o, Antoni

GRABOWSKI<sup>5</sup>. Fakte en la jaroj 1908–1914 Grabowski respondecis pri la unuaj E-kursoj en kelkaj lernejoj en Varsovio. En artikolo verkita en 1908, li priskribis la ecojn de E-o por enkonduki al la studo de la franca kaj de la latina, kio ŝajnis tre stranga al la tiutempa publiko.

Post tiuj unuaj observoj estis multaj praktikaj eksperimentoj ĝuste pri ĉi tiu temo. Por doni ideon pri la multeco de la eksperimentoj sekvas listo nekompleta de ili, pri kiuj ekzistas bona dokumentado:

- Girls' Middle School en Bishop Auckland (Britujo)
- Bishop's Elementary School, Auckland (Nov-Zelando)
- Wellesley College, Department of Psychology (Massachusetts, Usono)
- Columbia University, Novjorko (Usono)
- Public High School en Novjorko (Usono)
- Provincial Grammar School en Sheffield (Britujo)
- Egerton Park School, Denton (Manchester, Britujo)
- Middle School en Somero (Finnlando)
- Internacia Pedagogia Eksperimento de ILEI en kelkaj eŭropaj landoj
- Lingva Orientado, Paderborn (Germanujo)
- Eksperimentoj en italaj elementaj lernejoj
- EKPAROLI (Melbourne, Aŭstralio)
- Springboard to languages (Britujo)

Ĉi tiuj estas nur parto de la eksperimentoj. Aliaj estas troveblaj en Corsetti kaj La Torre (1993) aŭ en Corsetti kaj La Torre (1995).

Oni povas havi dubojn pri la rezultoj de tiuj eksperimentoj, sed ili ĉiuj indikas al tio, ke lernado de tria lingvo fare de lernintoj de E-o estas pli sukcesa. Oni povas havi dubojn pri la scienca kontrolo de kelkaj el ili, sed certe ne pri, ekzemple, la lastatempa en Aŭstralio, kontrolita de la Universitato Monash. Bedaŭrinde en ĉi tiu okazo la eksperimento estis interrompita, kaj ni havas nur la indikojn el la intervjuoj kun la tre entuziasmaj lernantoj pri la plezuro lerni E-on.

Sen ebla dubo el la scienca vidpunkto ŝajnas al mi almenaŭ la rezultoj de la eksperimento farita en Britujo en la Provincial Grammar School en Sheffield kaj kontrolita de J. H. HALLORAN, Universitato de Sheffield<sup>6</sup>, kies konkludoj estas inter la plej sobraj. La eksperimento daŭris 4 jarojn, fine de la 40-aj kaj komence de la 50-aj jaroj. La lingvoj estis la

---

<sup>5</sup>[http://en.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://en.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski)

<sup>6</sup> Halloran, 1952.

angla, *LI* de ĉiuj lernantoj, E-o kaj la franca, tria lingvo por la eksperimenta grupo kaj dua lingvo por la kontrol-grupo. La eksperimenta grupo studis E-on dum unu jaro, dum la kontrol-grupo rekte komencis studi la francan. Ekde la dua jaro E-o estis forlasita kaj la eksperimenta grupo transiris al studado de la franca.

La esploroj faritaj de Halloran fine de la kvar jaroj montris plurajn aferojn, sed tio, kio plej interesas nin en ĉi tiu kunteksto estas la jena:

“1. En la kazo de malpli inteligentaj lernantoj, tiuj, kiuj dediĉis la unuan jaron al Esperanto, konis la francan pli bone (laŭ mezuroj faritaj per 11 malsamaj testoj) je la fino de 4 jaroj, ne dediĉante al la franca pli da tempo dum la postaj 3 jaroj”<sup>7</sup>.

Ŝajnas al mi, kiel esploranto pri ĉi tiuj fenomenoj, ne eble ne akcepti almenaŭ ĉi tiujn konkludojn, kiuj simple rezultas el la fakto, ke E-o estas lingvo kiel ĉiuj aliaj, sed kun pli travidebla gramatika strukturo, kiu ebligas al lernantoj mem pripensi pri la funkciado de lingvoj inkluzive de la propra.

Multaj duboj estis daŭre esprimitaj de mi mem pri tio, ke neniu reprenis la komencan sugeston de Szerdahelyi pri la neceso konsideri la lingvojn unuan kaj trian, kaj surbaze de ilia "proksimeco" inter si kaj kun Esperanto testi la efikon de Esperanto al la lernado de la tria lingvo fare de parolanto de difinita unua lingvo. Alivorte, se Esperanto helpas hungaran infanon lerni la francan, tio ne signifas ion pri la helpo de Esperanto al pola infano, kiu devas lerni la rusan.

Kompreneble la lernado de Esperanto havas iun pli ĝeneralan efikon. Lerninte facilan lingvon, la lernanto estas pli entuziasma alfronti la lernadon de nova lingvo. Tio validas por ĉiuj lingvoj. Krome, kaj aparte por Esperanto, la facila strukturo de la lingvo ebligas kompreni rapide kelkajn bazajn lingvajn fenomenojn kaj helpas akiri pli grandan prilingvan konscion. (*daŭrigota*)<sup>8</sup>

---

<sup>7</sup> En la originalo: *1. In the case of the less intelligent pupils, those who had devoted the first year's language study to Esperanto did better in French (as measured by eleven different kinds of tests), at the end of four years, without spending any extra time on French in the three years.*

<sup>8</sup> La bibliografio kaj la originala prelego troveblas ĉe [www.ilei.info/pdf/Corsetti\\_SzI.pdf](http://www.ilei.info/pdf/Corsetti_SzI.pdf)



## Esperanta pedagogio por denaskuloj

de Radojica PETROVIĆ (Serbio)

Okdeko da esperantistoj – denaskuloj aĝaj inter 6 monatojn kaj 17 jarojn kaj iliaj gepatroj kaj geavoj, el dekkvino da landoj de tri kontinentoj (Eŭropo, Latin-Ameriko kaj Azia parto de Rusio) – kolektiĝis komence de aŭgusto en la bieno Katai<sup>9</sup> apud la vilaĝo Mali Idjoš<sup>10</sup> (hungare Kishegyes), en la norda Serbia provinco Vojvodina) por la 31-a REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj), por ĝui kaj praktiki la senperan komunikadon per la komuna lingvo tra ludoj, ekskursoj, surloke inventitaj konkursoj kaj aliaj aktivajoj de la 12-taga kunvivado. Malfacilas difini precize la nombron de landoj el kiuj ili venis, ĉar, ekzemple, kiel kalkuli la familion en kiu la patrino estas japan-armendevena britino kaj la patro germano, loĝantaj en Francujo kaj laborantaj en Svisujo?

La vilaĝa medio de la renkontiĝo havigis senperan kontakton kun la

naturu kaj malferman terenon por infanaj ludoj kaj imagopovo. Rajdado sur ĉevalo kaj azeno, observado de kortbirdoj kaj brutaro, veturado per ĉevalĉaro, serĉado de fantomdomo inter maizkampoj, fragmitejoj kaj

### El raporto de S. MacGill

Gepatroj kiuj konscie edukis siajn infanojn du- au tri-lingve evidente (vole-nevole) okupiĝas pri instruado – do inter REF kaj ILEI kuŝas komunaj interesoj. Dum kelkaj tagoj partoprenis en la aranĝo la pasinta kaj la nova prezidantoj de ILEI (Radojica Petrović kaj Stefan MacGill). Do, nesurprize, ke okazis programeroj pri tio. Radojica prezentis lumbilde la atingojn de universitata ILEI-seminario en Kinŝaso, DR Kongo, kaj Stefan prezentis la novan estraron, celojn, planojn, revuon kaj retejon de ILEI, kune kun informoj pri la sekva konferenco en Kubo kaj la oferto de *Juna amiko*, kiu tre precize pretigas erojn kun valoro por denaskaj esperantistoj. Tiun tuton evidente necesis iel dolĉigi, kaj tio okazis per la aldono de skeĉoj.

<sup>9</sup> <http://www.kataitanya.co.rs/index.php>

<sup>10</sup> <http://www.kishegyes.rs/esperanto/informoj.html>

## El impresoj de Nikola Markarian

Krome ankaŭ belis vesperaj rakontoj kie ĉiu infano mem povis kontribui proprajn ideojn dum gvidata rakontado. Ili decidis kiel la rakonto nomiĝu, kiu aperu en ĝi kaj kion ili faru. Ili ŝajne tre ĝuis tiun kreativecstimulan manieron mem krei kaj evoluigi rakontojn.

Por mi, la plej bela momento de ĉi tiu REF koncernis mian 4-jaraĝan filon kiu ĝis nun ne kredis sin kapabla paroli Esperanton, kvankam li pasive tute bone komprenas la lingvon. Je la komenco de REF li tute enamiĝis al eta urugvajanino. Kvankam ŝi estis ege ĉarma, ni iom timis, ke tiu rilato detruos la E-paroligan efikon de REF, ĉar ili ambaŭ regas la francan. Feliĉe li poste ankaŭ amikiĝis kun kroataj kaj hungaraj geknaboj kun kiuj li povis komuniki nur Esperante. Mi tiom ĝojis kiam, post ĉirkaŭ 10 tagoj da REF, mi aŭdis lin tute flue kaj klare klarigi esperantlingve al aliaj knaboj la regulojn de por ili nova kartludo.

boskoj, improvizoj sur lignaj instalaĵoj en subĉiela ludejo de la bieno, manlaboroj (figuroj el pajlo kaj maizoŝelo, sakoj el ŝaflano aŭ ledo, globetovoj el rubaĵo, domoj el kartono, konkursaj paperaviadiloj), bivakfajro kun maizrostado, grimrado sur pajlostakon kaj konstruado de domo el pajlo aldonis neforviŝeblajn vivospertojn en la memortrezorojn akiratajn pere de E-o. Vasta ligna, subtegmenta sed senmura, amfiteatreca programejo kun sendrata retaliro estis plaĉa okazejo de granda parto de la programo. La kvar manĝoj tage plaĉis al ĉiuj per sia diverseco kaj bongusto, kvankam eĉ mildigita hungareca gusto ŝajnis iom tro forta por kelkaj okcident- kaj nord-eŭropanoj kun aliaj manĝokutimoj.

La ĉeforganizantoj – familio Csóke el Mali Idjoŝ – meritas senrezervajn laŭdojn kaj dankojn.

Promenaj kaj busaj ekskursoj kondukis al abelejo por vidi abelkomunuman vivon interne

de la abelujoj kaj gustumi abelproduktojn, al panbakeja muzeo por konatiĝi kun tradiciaj iloj kaj procedoj de panbakado kaj gustumi tradicireceptajn kukojn, kiujn la infanoj kaj gepatroj mem bakis sur malferma fajro, al arkitekturaj ravaĵoj de la urbo Subotica kaj al proksimaj lagoj por naĝi kaj remi.

La programo ne estis speciale antaŭpreparita, krom la ĝenerala program-skemo, sed spontane kreskis el sinproponoj de la gepatroj kaj talentoj de la infanoj. Ĝi estis anoncata sur la afiŝtabulo por 1 – 3 sekvontaj tagoj. Por ĉiutaga komuna kantado estis antaŭpreparita kantareto de la 31-a REF kun esperantigitaj aŭ adaptitaj infankantoj el diversaj kulturoj. Rakontvesperoj estis aranĝitaj jen kun lumbildoj ilustrantaj la legatan rakonton, jen kun partopreno de la infanoj en inventado de rakonto lanĉita de la plenkreska rakontanto. Konkursaj ludoj kaj improvizitaj teatraĵetoj estis vervaj kaj gajigaj. Muzikaj talentuloj koncertis en salono de loka lernejo. La gepatroj havis siajn temojn por prelegoj kaj interŝanĝo de ideoj kaj spertoj.

Per sia programo kaj gepatra interŝanĝo de spertoj kaj ideoj REF malfermas demandojn kaj proponas studindan materialon por siaspeca denaskula Esperanto-pedagogio. La Esperanto-metodika literaturo okupiĝas ĉefe pri instruado kaj lernado de Esperanto kiel fremda lingvo kaj iom pri ĝia propedeŭtika valoro por lernado de aliaj lingvoj. Kvankam la E-denaskula komunumo ne estas tre multnombra kompare kun la E-komunumo entute, REF klare montras, ke la Esperantan pedagogion atendas esplorproblemoj sur la tereno de lernado de Esperanto kiel gepatra lingvo, des pli ĉar Esperanto estas lernata neniam kiel la sola denaska lingvo kaj tio faras grandan diferencon kompare kun lernado de aliaj gepatraj lingvoj en unulingvaj medioj.

Diversaj estas la spertoj el denaskulaj familioj kie ambaŭ aŭ nur unu el la gepatroj estas esperantisto loĝantaj en la propra (nacia) aŭ fremda lingva medio, aŭ kun denaske diverslingvaj gepatroj uzantaj Esperanton kiel familian lingvon en la denaska lingva medio de unu el ili aŭ fremda por ambaŭ. Ĉiukaze la infano eklernas almenaŭ du, aŭ tri aŭ eĉ kvar lingvojn paralele. Kiel certigi harmonian evoluon en ĉiuj lernataj lingvoj kaj eviti konfuzojn? Ekzemple, se unu el la gepatroj elektas paroli kun la infano ekskluzive en Esperanto, kiel la infano reagos aŭdante lin aŭ ŝin paroli kun la alia el la gepatroj alian el la lingvoj kiuj estas neeviteble uzataj en la familio? Ĉu, pli bone, la ekskluziveco estu aplikata nur en situacioj sen alilingvaj kunparolantoj? Aŭ, etika demando, ĉu la neesperantistaj parencoj kaj amikoj konsideros kiel malĝentilaĵon se, en ilia ĉeesto, patro aŭ patrino interparolas kun la infano nur en E-o por ne damaĝi la lingvoakiradon? Kiel, do, konduti en tiaj cirkonstancoj?

Diskutante pri tiuj kaj similaj demandoj, la gepatroj en REF venis al la konkludo, ke formala instruado kaj lernado de E-o por denaskuloj, kun adekvataj lerniloj kaj studmaterialoj, estas bezonata same kiel por aliaj lingvoj. Parolantoj de naciaj lingvoj trapasas formalan, institucion klerigadon, en kiu unu el la ĉefaj fakoj estas la gepatra lingvo. Same la spontana enfamilia lernado de E-o ne tute sufiĉas. Estas bezonataj adaptitaj programoj kaj lernolibroj por sistemigi, plifirmigi kaj levi al pli alta nivelo la denaske akiritajn lingvokonojn.

Konklude, REF estas ĉiujara renkontiĝo de specifa komunumo de esperantistoj, kiu ne estas formale organizita, tamen devus estis konsiderata kiel unu el la kolonoj de la daŭropovo de Esperantujo kaj meritas pli konscian kaj seriozan atenton de la E-movadaj institucioj.

## **Gimnastiko por la elementa lernejo**

de **Luiza CAROL** (Israelo)

Dum la lecionoj pri E-o en la elementa lernejo, oni povus uzi kelkajn minutojn por gimnastiki Esperante. Tio povus amuzi la geknabojn, forigi ilian eventualan enuon kaj samtempe riĉigi ilian vortprovizon (ĉar kio onin amuzas, tio estas plej bone memorata).

*A. Jen kelkaj sugestoj por gimnastikado:*

1. Agoj:

Atentu! Staru! Leviĝu piedpinte! Sidiĝu! Staru! Levu la brakojn! Mallevu la brakojn! Metu la brakojn sur la koksojn! Fermu la okulojn! Malfermu la okulojn! Tuŝu la plankon! Staru! Tuŝu la seĝon! Staru! Tuŝu la fenestron! Tuŝu la muron! Revenu al via loko! Aplauĉu! Sufiĉas! Ridetu! Ridu! Ploru! Kantu! Surmetu vian ĉapelon! Demetu vian ĉapelon! Surmetu vian koltukon! Demetu vian koltukon! Alportu al mi viajn gantojn! Prenu viajn gantojn! Sidiĝu! ktp...

2. Mimataj agoj:

Dormu! Vekiĝu! Manĝu! Trinku! Flugu! Kuiru! Purigu viajn ŝuojn! Kombu vin! Brosu viajn dentojn! Naĝu! Rajdu ĉevalon! Rajdu biciklon! Lavu vian vizaĝon! Desegnu! Veturigu aŭton! Akvumu floron! Pluku floron! Frapu tamburon! Balau! Kudru! Ludu gitaron! Ludu pianon! Ludu fluton! ktp...

3. Mimataj aĵoj aŭ estaĵoj:  
Rano. Kuniklo. Ĉevalo. Ponto. Boato.  
Kandelo. Kato. Papilio. Gruo. Ĝirafo [vd  
la fotojn] ktp...

B. Jen kelkaj ludoj pri gimnastiko:

1. La telefono.

La infanoj staras en vico. La unua en la vico frustras agon aŭ mimotan agon (aĵon, estaĵon) ĉe la orelo de la dua, la dua frustras tion, kion li/ ŝi komprenis ĉe la orelo de la dua ks. La lasta infano en la vico devas plenumi la agon, aŭ mimi la agon (aĵon/ estaĵon) pri kiu li aŭ ŝi aŭdis. Se tiu sukcesas, tiu fariĝas la unua en la vico kaj iniciatas la sekvan ludon, frustrante novan agon/ mimotan agon aŭ aĵon aŭ estaĵon.

2. Instruu la pupon.

Ĉiu infano havas po unu pupon en la mano. La instruisto faras la agon aŭ mimas la agon, dum la infanoj instruas la pupon, dirante al ĝi: Staru! Sidiĝu! Fermu la okulojn! Surmetu vian ĉapelon! ktp... Dormu! Vekiĝu! Manĝu! ktp...



3. Ĉesigu la agon de la infanoj.

Unu infano forlasas la ĉambron. Dum lia/ ŝia foresto, la aliaj infanoj komencas unu agon aŭ unu mimatan agon. La instruisto vokas la elirintan infanon, kaj tiu ĉi devas ĉesigi la agon de la aliaj infanoj. Se la infanoj sidiĝas, tiu devas diri: "Staru!". Se la infanoj havas fermitajn okulojn, tiu devas diri: "Malfermu la okulojn!". Se la infanoj mimas manĝadon, tiu devas diri: "Ne manĝu!" aŭ "Ĉesu manĝi!" ktp...

4. Ĉesigu la agon de la pupo.

La instruisto manipulas la pupon, kaj la infanoj devas ĉesigi la agon de la pupo, dirante al la pupo: "Malfermu la okulojn!", "Vekiĝu!" ktp...



## Ni kondolencas

### **Koos WIEBERDINK (1918-2009)**

Vendredon la 25-an de septembro en la plenplena aŭlo de la kremaciejo Driehuis-Westerveld ni adiaŭis neordinaran homon: Koos Wieberdink. Lian vivon skizis la filo Tjeerdo, kiu poste disponigis la tekston. Ekzistas kompleta Esperanta versio, laŭpete ricevebla. Ni resumas, escepte de la frazoj dediĉitaj al Esperanto.

Koos Wieberdink naskiĝis en 1918 en Weltevrede, apud la tiama Batavia, de gepatroj, kiuj ambaŭ praktikis medicinon. Li tamen finstudis en Nederlando. Ĉi tiu kuraĝa, absolute sincera kaj plendediĉa pioniro de malfermaj kor- kaj angi-operaciado jam dum milite savis judajn infanojn, cedis la propran pasporton al minacato. Pro tio li ricevis la Yad-Vashem-distingon en 2000, sed antaŭe jam nederlandan Bronzan Krucon pro vivdanĝera kuracado al soldatoj en Indonezio.

Kiam li kiel profesoro-kirurgo prioritatis la pacientojn, ne povis manki konfliktoj kun kolegoj. Li demisiis sed daŭrigis sian praktikadon en Jerusalemo, Indonezio kaj Novzelando. Tamen post nelonge oni bezonis lian kapablon en Amsterdamo kaj Roterdamo. Li verkis “Malferma kor-kirurgio” kaj “Cionismo kaj Socialismo” kaj iniciatis la fondaĵon “Scienca Esplorado de Kristana Literaturo pri Judoj kaj Judismo”. (Noto de la resuminto: Unu el ĝiaj publikaĵoj, “De zaak Jezus en de Joden” de prof. Tomson, aperis ankaŭ en Esperanto.)

Senkompromise li defendis Israelon, kio ne faciligis diskutadon. Kun-estadon kun muziko aŭ diskuto li ŝategis.

Krome li komencis lerni E-on. Li estis konvinkita ke la vasta diskonigo de universala lingvo, ne ligita kun ajna lando, povas grave kontribui al la paco. Li ankaŭ engaĝis sin por la katedro pri E-o, kiu antaŭ nelonge efektiviĝis. Li forpasis hejme, sendolore, la 17-an de septembro, pli-ol-90-jara.

Ni aldonu: Apud la meritoj de Hans Erasmus, Edwin Burg, Marc van Oostendorp k.a. ni do enskribu en la Panteonon de la E-instruado la nomon de Koos Wieberdink. (Rob MOERBEEK)

### **Adriana MIDDELKOOP (1913-2009)**

Adriana J. Middelkoop forpasis la 14-an de novembro en Hilversum (Nederlando). Ŝi lernis E-on en la 30-aj jaroj. Ĉiu nederlandlingva esperantisto konis ŝian nomon pro ŝia vortaro "Nederlands-Esperanto-

Nederlands", kies unua eldono, 427-paĝa, aperis en 1971 en la prestiĝa vortara serio Prisma de la eldonejo Spectrum. Ĝi estis laŭdata kaj konsiderata unu el la plej bonaj E-vortaroj. Reviziita eldono aperis en 1986 kaj represoj jam en 1987.

Middelkoop membris en la ekzamenkomisiono de Nederlanda E-Asocio 1965-1987. Ŝi estis estrarano de NEA 1967-1982 – en jarkunvenoj oni ofte laŭdis ŝian protokoladon kaj plenumon de la kultura tasko. Ŝi membris ankaŭ en la ŝtata ekzamenkomisiono pri instrukapableco de E-o. Middelkoop estis privat-docento pri E-o ĉe la Universitato de Amsterdamo 1969-1978 kaj artikolis i.a. pri leksikografio kaj terminologio. En 1950 aperis ŝia konciza faktaro por elementaj ekzamenoj, "Doktoro Zamenhof, Esperanto kaj la Esperanto-movado" (3-a eld. 1984). Ŝia prelego "Humuraj trajtoj en la Esperanto-literaturo", farita okaze de ŝia enoficiĝo kiel privat-docento en 1969, aperis en dulingva eldono en 1994. Ŝi tradukis "Elektitaj eldiroj de la sankta profeto Mohammad" kaj "Elektitaj partoj el la verkoj de la promesita mesio" (ambaŭ 1991). Middelkoop estis honora membro de UEA ekde 1988 kaj de ILEI ekde 2004.

ILEI esprimas siajn kondolencojn al la familianoj kaj ŝiaj amikoj en nia nederlanda sekcio.

#### **Helga FARUKUOYE (1943-2009)**

Helga Farukuoye naskiĝis 1943 en Vieno kiel Helga VOKAL, kaj mortis tie la 12-an de julio 2009. Ŝi edukiĝis dulingve, kiam en 1945 ŝia patro komencis paroli kun ŝi en E-o. Ŝi ofte rakontis ke tiu sperto, kaj speciale la klara strukturo de E-o, poste multe helpis al ŝi pli facile lerni aliajn lingvojn. Kiel fremdlingvojn ŝi regis skribe kaj parole la anglan, la francan, la italan, la hispanan, la kroatan, la japanan kaj kelkajn afrikajn lingvojn. En la universitato de Vieno ŝi studis la latinidajn lingvojn kaj la germanan, kaj magistriĝis 1971. En 1975 ŝi edziniĝis al niĝeriano, kun kiu ŝi havas du filinojn. De aŭgusto 1980 ĝis aŭgusto 1984 la tuta familio vivis en Niĝerio. En *Adeyemi College of Education*, universitata institucio, ŝi instruis la francan kaj ankaŭ ofertis kurson de E-o, kiu estis ege sukcesa. Pro la politike malboniĝinta situacio en Niĝerio ŝi devis reveni kun siaj filinoj al Aŭstrio, kie ŝi daŭrigis la E-instruadon al afrikanoj perkoresponde. En 1998, dum la UK de Montpellier, ŝi ricevis pro tio la premion *Deguĉi*. En 1994 ŝi magistriĝis pri interlingvistiko en la universitato de Budapeŝto. De 1995 ĝis sia pensiĝo fine de 2004 ŝi laboris en la E-muzeo de Vieno. Pli ol



dudek jarojn ŝi instruis la internacian lingvon en la popola altlernejo Brigittenau, kiu situas en la samnoma 20-a distrikto de Vieno. Al E-o ŝi krome servis okupante multajn funkciojn en diversaj E-asocioj.

En la jaro 2004 ŝi grave malsaniĝis je mama kancero, kiun ŝi dum jaroj kun grandaj optimismo kaj vivoforto kontraŭbatalis. Post kvin jaroj fine la jam nekuracebla malsano venkis kaj ŝi mortis en la varma kaj konsola etoso de sia amata familio. Speciale ŝiaj du filinoj, Michaela kaj Monika, estis grava helpo en la plej senesperaj momentoj de ŝiaj lastaj monatoj.

Kun ŝi la E-movado en Aŭstrio kaj ankaŭ sur internacia nivelo perdis grandan apogon.

## *El la landoj kaj sekcioj...*

### **Bulgario**

La 1-a de aŭgusto 2009 estis festo-tago por la E-societo “Hristo Manolov”, urbo Polski Trambeŝ, Bulgario. Okazis tiam la dua, jam tradicia “Festo de la minerala akvo”. Ĉi-jare la festo estis dediĉita al la 150-a datreveno de Zamenhof. La gastoj renkontiĝis ankaŭ kun junaj esperantistoj de la lernejo “Canko Cerkovski”, kiuj partoprenas en internacia projekto kune kun francaj, polaj kaj hungaraj gelernantoj. La projekto daŭros 2 jarojn. La unua renkontiĝo okazos novembre en Bulgario kaj en ĝi partoprenos reprezentantoj de ĉiuj partneraj lernejoj.

Se iu volas kontakti la junulojn de Polski Trambeŝ, skribu al: [verdajsteletoj.bg@mail.bg](mailto:verdajsteletoj.bg@mail.bg), Mariana GENĈEVA, SOU “Canko Cerkovski”, BG-5180 Polski Trambeŝ.

### **Ĉinio**

#### **Seminario de ILEI-Ĉinio okazis en la Lushan-Montaro**

De la 15-a ĝis la 16-a de oktobro 2009 okazis seminario de ILEI-Ĉinio kun la temo “Kiel lernigi Esperanton al lernantoj” en la mont-vilaĝo Tingtao ĉe la Dongling-Kanjono, piede de pitoreskejo Lushan-Montaro en la urbo Jiujiang, sud-Ĉinio. Sume 20 membroj kaj instruad-amatoroj el Ĉinio, Koreio, Hispanio kaj Usono ĉeestis la seminarion.

Dum la seminario profesorino Gong Xiaofeng (E-nomo Arko), sekciestro de ILEI-Ĉinio, faris labor-raporton de la sekcio por la jaroj 2008-2009,





konigis la laborplanon por 2010 kaj petis opiniojn de la ĉeestantoj. S-ro Wei Yubin kaj vic-profesorino Song Ping [vd la foton] prezentis respektive trejnadojn de E-o en la urboj Taiyuan kaj Harbino. Dennis Keefe el Usono konigis E-instruadon ĉe la Universitato Nankino kaj Augusto Casquero el Hispanio (nuntempe ili instruas E-on en Ĉinio) faris prelegon pri planlingvoj. Dennis Keefe kaj Arko montris respektive instru-metodojn de Esperanto. La ĉeestantoj faris varman diskutadon pri problemoj, ekz. kiel funkcios la sekcio en Ĉinio? kion fari kaj kiel fari

en 2010? kaj pri lernolibroj, instruhelpiloj, metodoj, son- kaj vidmaterialoj ktp. En la seminario oni decidis okazigi la someran seminarion de la Ĉina Sekcio de ILEI en aŭgusto 2010 en Taiyuan de la Shanxi-provinco. Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, sendis gratul-leteron kaj ankaŭ aliaj asocioj en- kaj eksterlandaj gratulis pro la okazigo de la seminario.

*Gong Xiaofeng, sekciestro de ILEI-Ĉinio*

## Francio

### Oficiala E-kurso en la universitato de Mulhouse

Ekde septembro 2009 ekzistas E-kurso en la Universitato de Alta Alzaco, en Mulhouse, kadre de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj. Ĝin sekvas deko da studentinoj de la unua kaj dua jaroj de lingvaj studoj kaj historio. La kurson gvidas Edmond LUDWIG, prezidanto de Esperanto France-Est. La dekanino, Sinjorino Yann KERDILES, kiu jam prelegis en Mulhouse pri la lingvoproblemo, petis plurajn sinsekvajn jarojn la Esperanto-grupon de Mulhouse starigi budon en la fakultato okaze de la Tago de Malfermaj Pordoj. Post malkovro de Esperanto per memlernado, li decidis proponi la kreon de tiu kurso.

E.L.

## Kongo

Kiel planite kaj anoncite, la unua E-leciono ĉe Lerneja Komplekso Anna Paolizzi okazis la 7an de novembro 2009. Granda entuziasmo miaflanke kaj flanke de instruistoj/lernantoj: partoprenas en la E-kurso la instruistoj, ankaŭ la administrantoj; eĉ ankaŭ la gardisto. Do, ni firme ekvojis kaj ni esperas bone atingi la celon. Estas substrekinda la ĉeesto, ĉe la inaŭguro, de la prezidanto de la landa asocio, de kelkaj esperantistoj de la EKM-filio, inter ili, kelkaj membroj de la ILEI-sekcio. La etoso estis tute Esperanta kaj frata en tiu bela lernejo, kiu tute aspektas esperantista. Jam ĉe la eniro, oni povas legi la nomojn "Zamenhof", "Esperanta konstruaĵo", "CER-ES, IKUE, KUKU". Tio kaptas la atenton de la trapasantoj. La pentraĵo sufiĉe propagandas Esperanton.

Kiel planite, la unua etapo temas pri la E-trejnado de la instruistoj kaj la dua etapo temas pri la E-trejnado de gelernantoj fare de instruistoj. Laŭ la nuna disponebleco de E-lernolibroj, ni uzas la Zagreban Metodon. Ni planas fini tiun bazan kurson post tri/kvar monatoj. Ni planas dum tiu fazo iri pluen por ke niaj lernantoj lernu preskaŭ la kompletan gramatikon de E-o. Do, eble ni aldonos unu monaton al nia programo. Komprenoble, ke ni trejnas estontajn E-instruistojn, kio devas havi efikan bazon.

Dankon al ĉiuj, kiuj kuraĝigis nin kaj promesis subteni la agadon aŭ sendis librojn kaj kuraĝigajn mesaĝojn.

*Jean Bosco MALANDA,  
BP: 761 Kinshasa 11 RDC, jbmalandal@yahoo.fr*

## Edukado en Ĉinio

de **Augusto CASQUERO** (Hispanio)

### *Historio*

La radikoj de la sistemo de formala edukado en Ĉinio atingas almenaŭ la 16-an jarcenton antaŭ Kristo, la dinastion de Shang (1523-1027 a.K.). Dum tiu periodo, edukado estis la privilegio de nur kelkaj elitoj, kaj plejparte ekzistis por neniu alia kialo ol por 'produkti' ŝtatajn aŭtoritatulojn. Tiutempe, la edukprogramo baziĝis sur la tiel nomataj 'Ses Artoj': ritoj, muziko, arkpafado, Chairot-legado, historio kaj matematiko. Kvankam, bazita sur la instruado de Konfuceo (551-479 a.K.) dum Printempo kaj Aŭtuno kaj Ŝtatoj de Milito (770-221 a.K.), la edukprogramo laŭgrade

liberigis la vojon por la sistemo bazita sur la ‘Kvar Libroj’ kaj ‘Kvin Klasikstudoj’ . Tiuj verkoj skizadis la principojn de socio kaj aŭtoritatoj, kodojn de persona konduto kaj kolektive difinis la filozofion de Konfuceo, kiu kaŭzis fundamentan influon al fakte ĉiuj aspektoj de la vivo, kaj certe al edukado, almenaŭ ĝis la Liberigo kaj kreskis je povo dum la komunisma periodo komenciĝanta en 1949.

La sistemo, kiu edukis la eliton, estis determinita kaj firme subtenita, ankaŭ por la sekvontaj generacioj, la edukita elito apogiĝis sur amasa analfabetismo. La imperiaj aŭtoritatoj estis aktivaj pri edukado nur tiusence, ke ili administris la variajn nivelojn de la imperia aŭ civil-serva ekzamenado, kiu estis uzata por elekti inter la imperiaj oficuloj. La ekzamenoj mem konsistis el eseaj demandoj, kiuj testis la komprenon de la kandidato pri la instruado de Konfuceo. La studentoj povis prepariĝi por tiuj ekzamenoj per enskribiĝo al privataj institucioj tiel nomataj *shuyuan*, kiuj ekzistis nur por prepari studentojn por la ekzamenoj je civila servo. Unu rakonto travivis dum generacioj, traktanta la malfacilecon kaj konkurencon en tiuj ekzamenoj: iu ambicia vilaĝano komencis prepariĝi por la ekzamenoj en frua junaĝo kaj ne sukcesis esti akceptita ĝis li iĝis 54-jaraĝa. Antaŭ ol esti akceptita, li dum longa tempo estis malestimita de la familianoj kaj amikoj – finfine lia sorto ŝanĝiĝis tiom drame, ke li freneziĝis pro ĝojo.

Do, ni povas vidi, ke Ĉinio havas historion de selektado de talentoj tra naciaj ekzamenoj kaj tiel la civitanoj traktis la gravecon de ekzamenoj tiom altestime.

### *Hodiaŭ*

Nuntempe Ĉinio havas nacivastan sistemon de publika edukado, kiu inkluzivas bazlernejojn, mezlernejojn (malsuperan kaj superan), kaj universitatojn. Naŭ jaroj de edukado estas formale devigaj por ĉiuj ĉinaj studentoj. La edusistemo garantias senpagan bazedukadon dum ses jaroj (iuj provincoj povas certigi nur kvin jarojn por bazlernejo, sed kvar jarojn por mezlernejo), kun komenco je la aĝo de sep aŭ ses jaroj, kaj daŭrigo per ses jaroj de mezlernejo por studantoj 12-18-jaraĝaj. Sur tiu nivelo estas tri jaroj de ordinara mezlernejo kaj tri jaroj de alta lernejo. La Ministerio pri Edukado raportis, ke bazlernejon vizitadas 99% de la infanoj kaj mezlernejon 80% de la gejunuloj. Ekde kiam senpaga edukado estis aboliciita en 1985, la kandidatoj al kolegioj kaj universitatoj devas konkuri

por stipendioj bazitaj sur universitataj ebloj. Privataj lernejoj estas permesitaj ekde la fruaj 1980aj jaroj.

### **Baza edukado:**

Baza edukado en Ĉinio inkluzivas antaŭ-lernejan edukadon, baz-edukadon kaj regulan mezlernejan edukadon.

Antaŭlernejo aŭ infanĝardeno povas daŭri ĝis tri jarojn, kun infanoj partoprenantaj ekde la aĝo trijara ĝis sesjara, kiam ili kutime eniras bazlernejon. La lernojaro estas dividita en du semestrojn.

La mezlerneja edukado estas dividita en ĝenerala mezlerneja edukado kaj specialigita/profesia/teknika mezlerneja edukado. La ĝenerala mezlerneja edukado konsistas el ĝeneralaj malsuperaj kaj superaj mezlernejoj. La studentoj finintaj la malsupran mezlernejon kaj dezirantaj daŭrigi la edukiĝon submetas sin al la loke administrata enirekzameno, sur kies bazo ili havos eblon aŭ daŭrigi en la ĝenerala supera mezlernejo aŭ eniri la profesion mezlernejon. La profesiaj mezlernejoj ofertas 2- ĝis 4-jarajn programojn kaj trejnas meznivelajn laboristojn, farmistojn, krome estradan kaj teknikan dungitaron. La teknikaj lernejoj normale ofertas 4-jarajn programojn por trejni mezprogresintan dungitaron. "Lernejoj por Lertaj Laboristoj" kutime trejnas studentojn post malsupera mezlernejo por postenoj postulantaj lertecon en produktado kaj operaciado. La trejnado daŭras normale 3 jarojn.

### **Alta edukado:**

Alta edukado sur subgrada nivelo inkluzivas 2- kaj 3-jarajn malsuperajn kolegiojn (ofte ankaŭ tiel nomatajn mallong-ciklajn kolegiojn), 4-jarajn kolegiojn kaj universitatojn ofertantajn programojn en kaj teoria kaj profesia studoj. Multaj kolegioj kaj universitatoj ofertas ankaŭ programojn gvidantajn al akiro de magistra aŭ doktora gradoj.

La ĉina alta edukado sur subgrada nivelo estas dividita en tri-jaraj kaj kvar-jaraj programoj. La unua ofertas ne nur mallong-ciklajn kolegiojn, sed ofte ankaŭ kvar-jarajn kolegiojn kaj universitatojn. La lasta ofertas kvar-jarajn kolegiojn kaj universitatojn, sed ne ĉiam tio gvidas al bakalaŭriĝo. Multaj ebloj en la alta edukado kreas ankaŭ la ĝeneralan kategorion de edukado por plenkreskuloj.

La kategorio de edukado por plenkreskuloj kongruas kun ĉiuj tiuj supre menciitaj kategorioj. Porplenkreskula bazedukado inkluzivas bazlernejojn por laboristoj, bazlernejojn por kamparanoj kaj skrib- kaj

legkapablajn kursojn. Porplenkreskula mezlerneja edukado inkluzivas radio- kaj televid-specialigitajn mezlernejojn, specialigitajn mezlernejojn por kadroj, specialigitajn mezlernejojn por dungintaro kaj laboristaro, specialigitajn mezlernejojn por kamparanoj, instruad-trejnadajn lernejojn kaj korespondad-specialigitajn mezlernejojn. Porplenkreskula alta edukado inkluzivas radio/televidajn universitatojn, kadrajn institutojn, kolegiojn por laboristoj, porkamparanajn kolegiojn, korespondadkolegiojn kaj edukadkolegiojn. Plejparto de la supremenciitaj kolegioj ofertas ambaŭ tri-jarajn mallongajn edukprogramojn; nur kelkaj ofertas subgradan edukprogramon.

### *Pozitivaj kaj negativaj flankoj de la ĉina edukado*

#### **Pozitivaj:**

##### *1) Longaj studadhoroj ≈ bonegaj kapabloj en testprenado*

La ĉina studentaro, kreskanta ĉe la skribotablo, estas tre bona en ekzamenado, kiu kontrolas la bazan scion. La studentoj estas lertaj pri enmemorigado de la teorioj kaj tre rapidaj dum solvado de matematikaj problemoj. Tial la ĉinaj studentoj superas la aliajn en ĉiaspecaj internaciaj ekzamenoj kiel ekzemple IELTS kaj GRE, eĉ se la taskoj estas en fremda lingvo kaj la test-preparantoj ne estas ĉinoj.

##### *2) Longaj studadhoroj ≈ pezlabora etiko*

En alta lernejo (kaj eĉ en malsupera alta lernejo), la plejmulto de la ĉina studentaro studas ĝis la fino de la studhoroj. Ili estas alkiutimigitaj al longaj horoj de solvado de matematikaj problemoj aŭ skribado de eseoj ĉe la skribotablo, kio preparas ilin por la peza labor-mondo, kiu atendas la plejmulton de la ĉinaj laboristoj, la profesiajn kaj tiujn kun bluaj kolumoj. Jaroj de nokta studado iĝas la realeco de kromhoroj, ekde kiam la tipa ĉino komencas laborvicon.

#### **Negativaj:**

##### *1) Troa koncentriĝo je libroj, ne praktiko*

Ĉinoj emas doni gravecon al superaj rezultoj kaj la studentaro estas facile dividita en diversajn klasojn laŭ rezultoj. Tio montras, ke pri multaj aferoj decidas nur rezultoj, kiel ekzemple ‘triobla-A’: eminenta studento, kolegia agnosko kaj ŝatado. Konsekvence, la studento ligiĝas al siaj libroj por akiri altajn rezultojn, multaj el ili iĝas eĉ ‘librotineoj’, multaj eĉ mensogas en la ekzamenoj. Sendube, tiu ĉi speco de la nur-libra kaj nur-porrezulta edukado havas larĝan fendon kun la socia praktiko. Pro tiu kialo multaj studentoj

trovas malfacilaĵojn dum eniro al la socia aktivado kaj reala negocmondo post la gradiĝo.

2) *Troa koncentriĝo al la scio mem, ne kiel gajni ĝin*

Kompare kun studentoj de evoluantaj landoj, la ĉinaj studentoj estas pli pasivaj kaj malpli kreemaj. Kial? Pro la rezult-orientiĝo, la studentoj ne estas kuraĝigataj al demandado sed al memorigado. Instruistoj kaj gepatroj zorgas pli pri tio 'Kion vi ellernis hodiaŭ?' anstataŭ 'Kiel vi ellernis tion?'. Kun bedaŭro oni rimarkas multajn ĉinajn studentojn kun alta IQ (ikuo: inteligentokvociendo) sed malalta EQ ((emocia kv.))! Ĉinaj studentoj estas al kutimigitaj doni la 'norman respondon' al la demando, pro tio ke oni postulas de ili enmemorigi la ŝlosilajn respondojn por la testo. Ili strebas lerni pasive anstataŭ pensi kree kaj kritike.

3) *Troa koncentriĝo je gravaj aĵoj, per mallarĝaj horizontoj*

Por travivi en moderna socio, la devo de kompetenta persono estas havi larĝajn horizontojn. Sed la realeco en la ĉina edukado estas vere frustriganta. Ekzemple, okazas ke medicina studento scias nenion pri filozofio, historio aŭ arto.

4) *Troa ŝarĝo por permesi al la vere interesiĝantaj studentoj lerni mem*

Ĉinaj studentoj ricevas tiom da hejmtaskoj kaj premo, ke ili akceptas la studadon kiel ŝarĝon. Ili estas pasivaj studantoj, al kutimigitaj al konvenciaj vojoj de pensado. Estas tre kredeble, ke kiam ili forlasos sian studentecon, ili fuĝos de la montoj de libroj por ĉiam. Vivlonga studado estas do pli ofta en la okcidenta mondo ol ĝi estas en Ĉinio.



# Esperanto per rekta metodo

de **Stano MARČEK** (Slovakio)

Esperanto per rekta metodo estas riĉe ilustrita rektmetoda lernolibro por komencantoj, taŭga ne nur por kursoj, sed ankaŭ por memlernantoj, al kiuj ĝi, danke al multaj ilustraĵoj, parte anstataŭos rektan kontakton inter la instruisto kaj la lernanto.

La lernolibro unue aperis en la slovaka, kaj dum tri jaroj ĝi estis eldonita en dudek du lingvoj. La 22-lecionan lernolibron, ilustritan de Linda Marčeková (mia filino), akompanas praktikaj didaktikaj materialoj: 500 Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (A5-formataj, kartonaj bildkartoj de la kursomaterialo, en du praktikaj kofretoj po 250 bildoj), KD kun la 500 Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (en PDF-formato, por komputila projekciado) kaj plia KD kun Modela elparolo (MP3-registraĵo kun voĉlegitaj Esperantaj tekstoj de la libro).

La studmaterialo baziĝas sur rekta, tielnomata indukta metodo: konkludi el konkretaj faktoj ĝeneralan leĝon, laŭ kiu la lernantoj – helpe de bildoj kaj analogio – subkonscie ricevas la klarigojn de la novaj elementoj kaj poste – en tekstoj kaj ekzercoj – reenkantas kaj ekzercas ilin ĝis alproprigo. En lecionoj, kie la akirita vortprovizo permesas klarigi novan vorton per la jam konataj, en la paĝgranda bildvortaro aperas klarigo en Esperanto.

Post la rektmetoda leciono venas la sekcio Gramatiko, en kiu nacilingvaj klarigoj firmigas la jam intuicie komprenitan materialon.

La lernolibra vortprovizo respektas la oficialan ofteco-liston (Baza Radikaro Oficiala, Aktoj de la Akademio II), kiun AdE rekomendas por ĉiuj lernolibroj de Esperanto. Ĝi ĉerpas la 750 pleje uzatajn vortelementojn (morfemojn) – komence la plej ofte uzatajn ktp – kaj garantias, ke la lernanto unue lernu la plej ofte uzatajn kaj pleje bezonatajn vortelementojn, por povi interkompreniĝi en la plej oftaj situacioj de la ĉiutaga vivo. Ankaŭ la gramatikaj elementoj estis anticipe dividitaj laŭ sia graveco kaj en la libro ili aperas en tiu vicordo. La unuopaj gramatikaj eroj estas alproprigataj en apartaj „paŝoj“ kaj klarigataj per indukta metodo. Surbaze de la jam posedataj konoj, helpe de ilustraĵoj, simboloj, analogio kaj kunteksto la lernanto komprenas la novan elementon subkonscie, intuicie. La „paŝo“ prezentas la novan elementon en diversaj situacioj kaj tipaj uzoj. La komprenon de la leksikaj elementoj helpas la kontinua bildvortaro, la paĝgrandaj filmstrieaj desegnaĵoj, en kies kadroj aperas la ilustraĵoj de la

entekste per ciferoj markitaj leksikaj aŭ gramatikaj eroj, kaj sekve, fine de ĉiu leciono, aperas subteksta vortareto – nacilingvaj tradukoj de la novaj vortoj (se la lernanto tamen ne bone komprenis iun nocion). Fine de la lernolibro aperas dulingva vortaro. Ĉiu vorto havas indokson, etan ciferon, kiu montras, en kiu leciono la vorto aperis la unuan fojon.

La lernolibro prilaboras la plej gravajn prepoziciojn kaj afiksojn, la problemon de -ig, -iĝ, participojn kaj refleksivon, kaj multajn ĉiutagajn paroltemojn, kiel familio, aĉetumado, homa korpo (eĉ dufoje), tagordo, naturo, sezonoj-tempoj, kalendaro ktp. La tekstoj estas priskribaj, monologaj kaj inter la didaktikcelaj materialoj legeblas ankaŭ proverboj, kelkaj fabeloj kaj literaturaĵoj.

La ekzercoj legigas, skribigas, respondigas kaj atentigas pri parkerigindaĵoj. Utila parto estas la librofina parto „La ĉiutaga Esperanto”, en kiu troveblas laŭtemaj listoj de plej oftaj parolturnoj de la lingvo. Kvankam ene de la libro ne troveblas informoj pri la movado, antaŭ la ferma enhavtabelo aperas listo de utilaj naciaj kaj internaciaj retejoj.

Kaj ankoraŭ unu freŝa novaĵo: Inspirita de la aŭstralia koresponda kurso, kiu uzas mian lernolibron *Esperanto by Direct Method*, mi lanĉis en Slovakio Korespondan kurson de Esperanto por komencantoj. Ĝi baziĝas sur mia lernolibro "*Esperanto priamou metódo*" (slovaka versio de "Esperanto per rekta metodo"). Informo pri la kurso troviĝas sur la retpaĝaro de Slovaka Esperanto-Federacio:



<http://www.esperanto.sk>.

La materialoj, kiujn per poŝto ricevas la aliĝinto, konsistas el:

- Papera dosierujo A4 kun kolora kovrilo (vidu la bildon)
- La lernolibro "Esperanto priamou metódo"
- La KD "Modela elparolo" (3-hora registraĵo kun voĉlegitaj E-tekstoj de la lernolibro)
- Instrukcioj kiel uzi la kurson kaj skribaj taskoj por la lecionoj 1 ĝis 7 (la ceterajn ricevdos la kursanoj rete).

Pri la koresponda kurso jam ekinteresiĝis kolegoj el Pollando kaj Danio. La rezulto estas, ke ankaŭ en tiuj du landoj estas lanĉitaj similaj korespondaj kursoj.



## Intervjuo kun Andrzej Pisowicz

Intervjuis: **Piotr NOSEK** (estro de la pola sekcio)

*1. El via vidpunkto kiel tiu de lingvisto, ĉu ekzistas unu natura (etna), neŭtrala kaj facile lernebla lingvo, kiu en superregiona skalo povus esti ponto inter homoj de diversaj nacioj, kiuj uzas ĉiutage malsamajn lingvojn?*

Jam en la komenco mi diros, ke mi estas pesimisto pri la ŝancoj fari iun ajn neŭtralan (ĉu naturan, ĉu artefaritan) lingvon instrumento de interkompreniĝado. La estiĝo de tia situacio bezonus grandan idealismon de milionoj da homoj, kaj tio estas nereala. Ĝis nun homoj ĉiam kaj ĉie opiniis, ke valoras peni ekregi (almenaŭ en minimuma grado) iun gravan (en la koncerna civilizacio) naturan lingvon. Ofte neceso devigis ilin fari tion. Kaj mi ne pensas, ke tio povas ŝanĝiĝi.

Sed, kompreneble, mi spirite subtenas la klopodojn de esperantistoj disvastigi la konon de tiu unusola artefarita lingvo, kiu "eltenis la provon de tempo" kaj ne fariĝis nura historiaĵo kiel la aliaj. Mi subtenas, ĉar ĝi estas bela ideo, kiun apogas gravaj argumentoj. Ekzemple tiu, ke la angla, pro sia fonetiko, verŝajne estas la malplej taŭga por ludi rolon de internacia lingvo. Sed tiu fakto tute ne kongruas kun la realo. Milionoj da neanglalingvanoj en la tuta mondo terure kripligas la anglan, sed tamen ĝuste en tiu lingvo ili interkompreniĝas. Kaj tio verŝajne ne ŝanĝiĝos, dum daŭros la politik-ekonomia dominado de la okcidenta mondo.

La rusa estas por neslavo ege malfacila pro la komplika fleksio, sed malgraŭ tio ĝi fariĝis interetna lingvo en la vastaj teritorioj de la eksa imperio (unue rusia, kaj poste sovetia). Oni povas facile multigi la ekzemplojn.

*2. El tio sekvas, ke pri la elekto de lingvo de interetna konversacio ofte decidas eksterlingvaj faktoroj. Kio, laŭ via opinio, devus esti la plej grava atuto de internacia lingvo – ĝia simpleco, neŭtraleco aŭ prestiĝo?*

Prestiĝo estas tre grava, kiam oni elektas lingvon de komunikado inter homoj parolantaj malsamajn lingvojn, sed ne ĉiam ĝi estas decidiga. Okazas, ke pli gravaj estas historiaj eventoj ne rilatantaj al kultura prestiĝo de la koncerna lingvo, sed al ties disvastiĝo bazita sur milita forto de iu etna

grupo (ekzemple la kazo de armenoj parolantaj en la pasinteco turke kun turkoj kaj azerbajĝane kun azerbajĝananoj)

Al la demando, kio devus esti la plej grava atuto de internacia lingvo, mi respondos: prestiĝo. Laŭ mia scio, ĝis nun neniam simpleco aŭ neŭtraleco estis bazo por elekti fare de iu etna grupo tiun aŭ alian lingvon por interetna komunikado.

*3. En via profesia praktikado vi instruis multajn lingvojn, kiuj estas malofte instruataj. Kio estas la plej granda defio por pedagogo instruanta nepopularajn lingvojn?*

Mia opinio la plej granda defio por pedagogo, kiu instruas nepopularajn lingvojn, estas... la konkurado de la popularaj lingvoj. Sed avantaĝo por orientalistoj estas la ekzisto (ĉe la studentoj) de grava psikologia faktoro: por iuj personoj "ekzotikeco", ankaŭ la fakto, ke io estas malfacila kaj malmulte konata ("malgraŭ ĉio mi ellernos tion") gravas. Kaj tio ligas la instruiston kun la studentoj. Lastatempe mi sentas tian kontentecon dum la instruado de la kartvela lingvo, kiun en ĉi tiu studjaro eklernis en Jagelona Universitato preskaŭ 30 personoj. Mi nur bedaŭras, ke la interesiĝo de la gejunuloj pri tiu ĉi lingvo estis motivita de la rusa-kartvela milito de aŭgusto 2008.

*4. Ĉu vi povus konsili ion al tiuj, kiuj klopodas realigi la ideon de internacia lingvo proksimiganta homojn?*

Mi ne scipovas konsili al esperantistoj ion prudentan. Mi nur povas deziri al ili sukceson en la penado konvinki homojn pri la ideo de neŭtrala internacia lingvo.

*5. En via vivo vi iafoje renkontiĝis kun esperantistoj. Kio post tiuj renkontiĝoj precipe restis en via memoro?*

Mi volus mencii mian instruiston de la armena lingvo, profesoron Gurgen Sevak el la Erevana Universitato, kiu estis granda amanto de Esperanto kaj esperantigis "Eŭgeno Onegin" de Aleksander Puŝkin.


## Ŝtrumpa truekzerco

de **Katalin KOVÁTS** (Hungario/Nederlando)

Gramatika ekzerco el la Lerniloteko de *Edukado.net* surbaze de fragmento el la romano *Hodler en Mostar*, verkita de Spomenka ŠTIMEC<sup>11</sup>. Nivelo: ekde komencintoj (A2).

Tasko: kompletigu la tekston per pronomoj kaj gramatike alĝustigu ilin laŭ la senco de la frazo.

«Jeanne ŝatis esti observata, sed nun ĝenis \_\_\_\_\_, ke la akcidento sur la ŝtuparo truis \_\_\_\_\_ dekstran ŝtrumpon, tiel ke la strio serpentumis de la plandumo trans \_\_\_\_\_ genuon en la mallumon ĉe la femuro. Tio nervozigis \_\_\_\_\_ multe. Ŝajnis ke ĉiuj vidas la truon sur la ŝtrumpo.



Ŝi diris al Meho, ke ŝi estas ĝenata de la ŝtrumpo, sed Meho jam en Serbio iom lozis \_\_\_\_\_ kriteriojn kaj nun en Bosnio, li eĉ pli flegmiĝis kaj li simple konsolis: – Eltenu, post ok horoj ni estos en Mostar. – Li redirektis la rigardon al \_\_\_\_\_ *Politika*.

Jeanne pensis ĉu peti \_\_\_\_\_, malsuprenigi la valizon en kiu estas nedifektitaj ŝtrumpoj, sed la ŝtrumpa manovrado en la vagono fortimigis

<sup>11</sup> La teksto estas senŝanĝe prenita el la romano, nur la pronomoj mankas.

\_\_\_\_\_ pli ol la imago kiel refermi la tro ŝtopitan valizon.

Ŝi decidis helpi al la transe sidanta sinjoro rigardi pejzaĝon tra la fenestro kaj preparis \_\_\_\_\_ por dormi sur la ŝultro de Meho. Sed unue ŝi kombis \_\_\_\_\_ harojn, oni neniam scias kiun oni renkontos en la sonĝoj. Tial ŝi, por ĉiu kazo refreŝigis la ruĝon sur \_\_\_\_\_ lipoj, observante \_\_\_\_\_ en eta pudrujo. Meho ne lasis \_\_\_\_\_ interesan gazetartikolon sed lia ŝultro akceptis \_\_\_\_\_ kapon helpeme, kiel iu kiu kutimas al dorlotbesto.

Post longa tempo, ekĝenis \_\_\_\_\_ la ostriĉa ŝultro de la edzo kaj ŝi rektigis la dorson.

Sur la fenestro estis multe da sunlumo kaj Jeanne kredis ke baldaŭ tagmezos. Montriĝis ke ŝi dormis dudek minutojn kaj ke ŝi rajtas ankoraŭ ripozi. La ĝentila kunvojaĝanto informis, ke la vojaĝo daŭros ankoraŭ almenaŭ sep horojn.

Ne indus kompare mencii kiom da horoj bezonus la ŝipo de Ĝenevo al Nov-Jorko.

Ŝi ne estis sur la ŝipo, ŝi estis en la vagono inter Sarajevo kaj Mostar kaj vojaĝis malrapide suden por renkonti \_\_\_\_\_ bopatron. Dum la dormo ŝi renkontis neniun.»

### **Solvo:**

---

«Jeanne ŝatis esti observata, sed nun ĝenis ŝin, ke la akcidento sur la ŝtuparo truis ŝian dekstran ŝtrumpon, tiel ke la strio serpentumis de la plandumo trans ŝian genuon en la mallumon ĉe la femuro. Tio nervozigis ŝin multe. Ŝajnis ke ĉiuj vidas la truon sur la ŝtrumpo.

Ŝi diris al Meho, ke ŝi estas ĝenata de la ŝtrumpo, sed Meho jam en Serbio iom lozis siajn kriteriojn kaj nun en Bosnio, li eĉ pli flegmiĝis kaj li simple konsolis:

– Eltenu, post ok horoj ni estos en Mostar. – Li redirektis la rigardon al sia *Politika*.

Jeanne pensis ĉu peti lin, malsuprenigi la valizon en kiu estas nedifektitaj ŝtrumpoj, sed la ŝtumpa manovrado en la vagono fortimigis ŝin pli ol la imago kiel refermi la tro ŝtopitan valizon.

Ŝi decidis helpi al la transe sidanta sinjoro rigardi pejzaĝon tra la fenestro kaj preparis sin por dormi sur la ŝultro de Meho. Sed unue ŝi kombis siajn harojn, oni neniam scias kiun oni renkontos en la songoj. Tial ŝi, por ĉiu kazo refreŝigis la ruĝon sur siaj lipoj, observante sin en eta pudrujo. Meho ne lasis sian interesan gazetartikolon sed lia ŝultro akceptis ŝian kapon helpeme, kiel iu kiu kutimas al dorlotbesto.

Post longa tempo, ekĝenis ŝin la ostriĉa ŝultro de la edzo kaj ŝi rektigis la dorson.

Sur la fenestro estis multe da sunlumo kaj Jeanne kredis ke baldaŭ tagmezos. Montriĝis ke ŝi dormis dudek minutojn kaj ke ŝi rajtas ankoraŭ ripozi. La ĝentila kunvojaĝanto informis, ke la vojaĝo daŭros ankoraŭ almenaŭ sep horojn.

Ne indus kompare mencii kiom da horoj bezonus la ŝipo de Ĝenevo al Nov-Jorko.

Ŝi ne estis sur la ŝipo, ŝi estis en la vagono inter Sarajevo kaj Mostar kaj vojaĝis malrapide suden por renkonti sian bopatron. Dum la dormo ŝi renkontis neniun.»

*Fonto: <http://www.edukado.net/lerniloteko/22521>*

## *Reago*

### **Pliaj motivoj por evoluigo**

Mi varme bonvenigis la artikolon de D. Keefe en n-ro 2009/2. La bonvenigo ŝuldeblas al pluraj konsideroj, motivoj, el kiuj la aŭtoro mem konigas plurajn (studado de sciencaj temoj, utiligo en komerco k. t. p.). Oni povas pleje konsenti kun tiuj motivoj, kvankam kelkaj rimarkigoj estus menciendaj koncerne ilin.

La unua rimarkigo (kun kiu supozeble konsentas ankaŭ Keefe) estas, ke la tema riĉigo de niaj kursoj kaj lernolibroj estas nepra kondiĉo de la progreso de E-instruado kaj lernado (ja konsideru, ke ekzistas ankaŭ memlernantoj). Lasi temojn ekster la senpera, tradicia E-vivo (kongresado, klub-kunvenoj, amikaj rendevuoj k. s.) netraktataj tie signifas trudi al niaj lernantoj kun pli

ol averaĝe vasta interesiĝ-rondo dediĉi multajn jarojn al kompilado de studmaterialoj respondaj al ilia interesiĝo. Pro la ĉi-rilate iom mizera stato de nia instruado kaj lernigo mi malakceptas la aserton, ke E-o (ankaŭ nun, ĝis nun) estas facile finlernebla kaj ke la plimulto de la ges-anoj bone, tute regas E-on je nivelo kun ĉi tiaj postuloj. Bonaj, kontentigaj kursoj kaj lerniloj do devas ebligi la akiron de almenaŭ minimuma vorttrezoro ankaŭ en tiuj „novaj” terenoj.

Konsideru, ke la bezonateco de tia progreso kreskas proporcie kun la multobliĝo de E-aranĝaĵoj, entute kun tiu de la ebloj vojaĝi. E-istoj de nia epoko, dum sia restado eksterlanda, deziras kaj povas pli oftakaze viziti muzeojn, galeriojn (kaj kompreni la tieajn videblaĵojn, aŭdeblaĵojn), trudiĝas pli oftakaze peti orientadon kaze de vojerariĝoj en fremdaj urboj aŭ province, pli oftakaze utiligi la sanitarajn servojn de la fremda lando, peti informojn pri veturoj per la publika transporto tie, ol pli frue. K. t. p. Sed temas ne nur pri vojaĝoj turismaj.

Niatempe Internet eĉ superfluigas la fizikan kunestadon de homoj kun samaj interesiĝoj kaj bezonantaj diskutadon pri demandoj kadre de la koncernaj interesiĝoj, disponigante al ili la eblojn partopreni en „senĉesaj konferencoj, simpozioj”, eĉ sen la neceso forlasi sian loĝejon. Internet do malfermas tiel vastajn perspektivojn por kunlaboro, interkomunikado de homoj kun diversaj lingvoj gepatraj sed kun samaj interesiĝoj, pri kiaj la homaro ĝis la apero de Internet povis nur revadi. Tio ĉi kvazaŭ taskas al verkantoj de niaj lernolibroj, gvidantoj de niaj lingvokursoj pliriĉigi la vortstokojn tie transigotajn je la fakterminoj de diversaj sciencoj, de la publika vivo internacia (politiko, medio-protektado, sociaj movadoj k. t. p.).

La entema evoluigo, prezentunte specialan kaj nemankigeblan elementon de la E-movado sur pli alta nivelo de evoluinteco, povus ankaŭ kiel movadtereno ekhavi gravecon pli grandan ol ĝis nun. Mi pledadas jam de multaj jaroj por radikala transformado de nia tuta E-movado. La rezulto de tiu transformado markus la ĝeneralecon de tia rilato membra-organizaĵa, ĉe kiu la membroj rigardus tion evidenta ne nur povi fruktuzi la tradiciajn servojn de niaj organizaĵoj, sed ankaŭ devi plenumi movadajn taskojn, starigitajn antaŭ ilin (alivorte: kiam nia komunumo transformiĝis en veran kolektivon). La plej grava tasko ĝia estus varbi-trejni E-parolantojn ĉe ĉiuj ejoj de la publikaj servoj ĉi-supre menciitaj, kadre de kio la E-pedagogojn (evidente engaĝuntajn sin kiel nepraj kunlaborantoj) atendus la tasko (krom eventuale varbi, precipe) trejni la „novkonvertitojn”.

Mi konscias, ke ĉi tiu projekto ankoraŭ estas tro utopia kaj tro nepreparita por tuj aŭdaci realigi ĝin. Mi ĝin tamen sentas inda je pripensado ankaŭ antaŭ ol la movadaj cirkonstancoj fariĝos pli ol nun favoraj por pli verve instigadi por ĝiaj konsidero kaj adoptado. Krome, ĉi tio ne malgravigas la ceterajn konsiderojn supremenciitajn rilate la demandon de evoluigo en instruado-lernigo.

*Johano PETIK (Hungario)*

## ILEI en la 35a Ĝenerala konferenco de UNESKO



Okaze de la 35a Ĝenerala Konferenco de UNESKO, kiu okazis en Parizo de la 6a ĝis la 23a de oktobro, la tri reprezentantoj – Arnaud Monique, Boulet Jean-Pierre kaj Lo Jacomo François – havis okazon ne nur informiĝi pri multaj aferoj – ekzemple: kulturaj mezuriloj, instruado en gepatra lingvo minoritata, kreivaj urboj... sed ankaŭ

informi homojn pri Esperanto kaj nia libreto "Rakonto pri Tarofolioj". Ili tiel ligis kontaktojn kun la delegacio de Malio kaj Benino, la ambasadorino de Kubo (kiu kompreneble jam scias pri la venonta UK kaj eĉ informis nin pri Esperantaj novaĵoj en Kubo), la ambasadorino de Madagaskaro kaj aliaj homoj, inter kiuj pluraj stabanoj de UNESKO el tre diversaj landoj, kiuj multe interesiĝis pri Esperanto eĉ skribante sloganon en Esperanto sur sian tabulon (Jean-Pierre petis kaj akiris permeson skribi: "ni parolu" kaj poste laŭ lia indiko respondeculo aldonis "Lingvoj gravas"). La vortaro, kiun oni donacis antaŭ kelkaj jaroj, bone videblis sur breto de la biblioteko, en kiu oni povas konsulti ankaŭ jarlibron de UEA, PIV.....

Multe helpis la kalendaretoj 2010 de JEFO (franca junularo), kiujn ni disdonis kiel donacojn. Danke al la mona subteno de GEE – la franca sekcio de ILEI – ni havis provizon de specialaj, ĝisdatigitaj flugfolioj por prezenti ILEI en la lingvoj franca kaj angla, kun tradukoj en la rusa kaj la ĉina en preparo, kun hispana kaj araba ankoraŭ sopirataj.

*Raportis: Monique ARNAUD kaj Jean-Pierre BOULET*

## Okazis "kuba" konferenco!

Vi ja ne maltrafis la konferencon en Matanzas, Kubo, sed *jam temp' está* aligi vin – vidu la aliĝilon fine de la numero. Ĉi tiu kuba kunsido temas pri la unua estrarkunsido de la nove elektita teamo; ĝi okazis en Roterdamo fine de novembro, koincide kun la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA. Tie, vic-prezidanto Duncan CHARTERS prezentis referaĵon pri la edukada engaĝigo de prof. d-ro Ivo LAPENNA tra la jaroj (kies resumo aperos en estonta IPR). En mallonga solenaĵo, Katalin KOVÁTS kaj Zsófia KÓRÓDY disdonis diplomojn de la novtipaj referenckadraj ekzamenoj. La akceptitaj ekzamenantoj ricevis atestilojn kaj deko da sukcesintoj ekposedis siajn diplomojn. Tagfine, la Estraro de ILEI prezentis sin kaj la ligan laboron al la publiko, laŭ reeĥoj tre sukcese (vidu la kovrilan foton kaj la hejmpaĝon de UEA – kun skribita raporto kaj filmita versio).

La kuban dimension kontribuis la ajnaĝa junulargasteja loĝigo de la kunvenantoj en avangarda konstruaĵaro (*vidu la foton*). Ses el sep estraranoj ĉeestis, kun reprezentanto de UEA kaj aliaj gastoj parttempe. Ne eblas raporti ĉion; pli plena raporto legeblas en la hejmpaĝo de ILEI.



*Pri 'Sekcioj kaj membraro' la Estraro...*

- Plusendos al la komitato aliĝpeton de hispana sekcio, post kiam la principoj kaj funkciado de reta voĉdonado estos enordigitaj;
- Ĝojas pri la starigo de sekcio en DR Kongo kaj atendas la petilon;
- Traktis la proponon de la ĉina sekcio eldoni membrokartojn;
- Trarigardis proponatajn varbilojn por membrokampanjo 2010 kaj arigis ideojn kiel eluzi ilin – ĉefe por atingi nemembrojn;
- Identigis sekciojn kiuj bezonas fortigon kaj landojn kun potencialo starigi sekciojn, kaj aparte atentis ilin en la revarba kampanjo;
- Lanĉos la raportadon de sekcioj por 2009 per modela respondilo, kies responditaj versioj devos reveni ĝis la fino de marto 2010;



- Alvokas al la sekciestroj ĝisdatigi la kontaktinformojn en la ILEI-ret-paĝo, tiel ke validaj informoj presiĝu en IPR 2010/1;

*Sub la punkto 'Komitato kaj komisionoj' la Estraro...*

- Proponos al la komitatoj kaj sekciestroj novajn diskutgrupojn ĉe Guglo por forigi plurajn nunajn teknikajn limigojn;
- Proponos principojn por retaj voĉdonoj, tiel ke la sekcia influo al niaj laboroj ne limiĝu al tiuj kies anoj povas ĉeesti konferencojn;
- Refoje apelacias al la landoj kiuj ne nomumis komitatojn tion fari: BE 1, BR 4, GB 1, NO 1, RU 1;
- Decidis ke la komisionoj ricevu apartan hejmpaĝon, kie aperu informoj pri ĉiu komisiono – konsisto, celoj, projektoj, raportoj...

## **Financoj**

La estraro proponis modifojn al la buĝeto 2010, bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj en la negativa direkto, aŭ por kovri novajn agadojn aŭ por malhelpi pereon de nunaj agadoj, pro la novaj respondecoj de la ĝisnunaj plenumantoj. Daŭras streboj restarigi ekvilibron. La estraro konstatis urĝan bezonon havi klaran superrigardon de siaj fondaĵoj kaj kapitalaj kontoj antaŭ ol akcepti signifajn novajn elspezojn. Tuj kiam tiu klareco ekestos, la rezultojn vi legos en la hejmpaĝo. La estraranoj renkontis unuafoje la novan kasiston kaj aŭdis rezultojn de labora semajnfino dediĉita al la orda transdono de datumoj kaj scioj de la antaŭa kasisto. Ĝojigas la efikeco de tiu transigo; ĉiu klare sentas, ke niaj financoj restas en kapablaj manoj. Post ĝisdatigo de nia registriĝo ĉe la komerca ĉambro, la ligo malfermos bankokonton en Nederlando.

## **Kuba Konferenco (la vera)**

La unua bulteno kaj aliĝilo pretas, unuaj aliĝoj alfluas. Ni konsentis okazigi trejnseminarion kadre de la konferenco, kunlabore kun la Amerika komisiono de UEA. Nia komisiito vojaĝos al Kubo en februaro, renkontiĝos kun LKK kaj vizitos la konferencojn. La programskemo estis diskutita – komence de ĉiu tago ĉiuj konferencanoj mallonge ariĝos kune; aldone al tradiciaj prelegoj okazos forumoj, fakulaj diskutoj, 15-minutaj rapid-intervenoj kaj demonstro-lecionoj.

## **Konferenco 2011**

La estraro havas du proponojn; estrarano tuj post la kunsido pluvojaĝis por konkretigi unu el tiuj ideoj; decido estas baldaŭ anoncota, cele al aperigo de aliĝilo antaŭ la konferenco 2010.

## **Strategia plano de UEA 2011-2020**

ILEI ricevis la nunan malneton de tiu plano kaj pretigas sin engaĝi en la polura procezo, unue por levi la profilon de edukado ĝis almenaŭ la sama nivelo kiel en la nun finiĝanta plano, due por zorgi, ke la plano pli klare prezentu siajn bazajn strukturon kaj konceptojn.

## **Diversaj**

ILEI, laŭplane kun UEA, proponos stipendiojn denove por la instruistotrejna kurso ĉe UAM en Poznan ekde sept. 2010, kaj alvokas al landaj asocioj simile proponi stipendiojn por faciligi la partoprenon de instruantoj el siaj teritorioj por altigi la kvaliton de la kursoj. Ĝi sekvas proponon starigi ILEI-Centron en la Esperanto-urbo Herzberg. ILEI kunlaboros en trejnkurso de *Flugiloj* en SES (Slovakio, julio 2010), planas okazigi seminarion pri stipendi-petado (Germanio, aŭtune 2010) kaj aktive partopreni en la Azia Kongreso (Mongolio, julio 2010) apoge al la iniciatoj de niaj aziaj sekcioj tie kunlabori kaj plani azi-nivelan laboron.

## **Eldonaj agadoj**

ILEI studas proponon kuneldoni gravan novan gramatikan manlibron – koncizigitan version de PoMEGo, kunlabore kun E@I kaj <lernu.net>.

Ĝis frue en 2010 ni devas prepari novan eldonon de la ekzamena gvidilo por la UEA/ILEI-ekzamenoj, kiu i.a. resumu la novajn ekzamenojn por blinduloj. La koncerna regularo estas legebla kaj aŭskultebla ĉe <edukado.net>.

Postrestas la tasko eldonigi simpoziajn kajerojn de 2005 ĝis 2009. Ni nun analizas kaj pritaksas la ricevitajn materialojn kaj lanĉas aktivan serĉon trovi la necesajn redaktorajn kaj manaĝerajn fortojn. Sur la atendo-listo (same atendante laborfortojn) kuŝas lernolibro de Judit FELSZEGHY el Hungario kaj reldono de la unua kajero de *Tendaraj tagoj*.

## **Instruista reta trejnkurso**

ILEI kun partneroj okazigas kelkloke ĉeestajn kursojn, sed ne ĉiu povas aliri ilin. Suplementiga retkurso valoras pro la vasta alireblo, eĉ se ĝi ne atingas la profundecon de viva kurso.



*Duncan CHARTERS transprenas sian diplomon dum la Malferma Tago, kiu atestas ke li sekvis kurson kaj trejniĝis kiel ekzamenanto laŭ la KER-sistemo (foto de Katalin KOVÁTS)*

La intenco estas lanĉi ene de ses monatoj preparan prov-kurson ĉe destinita fako en la nova interfaco de <edukado.net>. La kurso havos modularan strukturon kun libera lerno-ritmo. La kernkurso estos pri metodiko, probable je du niveloj, al kiu necesos aldoni almenaŭ du kromkursojn el elekto de ĉ. kvin, ekzemple: gramatiko, fonetiko, lingvistiko, movado, literaturo. La kursotaskoj estos pritaksitaj de kvalifikitaj gvidantoj, kiuj samtempe mentoras. Filmitaj model-lecionoj ludos gravan rolon, kiel ankaŭ ekzercoj kaj la devo pretigi lecionplanojn. La kurso finiĝos per ekzameno, kutime per fizika ĉeesto en renkontiĝo kaj plenumo tie de modela leciono. La lanĉaj partneroj estas ILEI kaj Edukado.net, kiuj eldonos diplomojn al kurs-finintoj. La kurso ne estos senpaga, sed ĝi estos vaste alirebla. Kernaj agantoj estas Katalin KOVÁTS kaj (por ILEI) Duncan CHARTERS – tiu mobilizos la necesajn fortojn por la liga kontribuo.

Dum la malferma tago okazis multaj koridoraj diskutoj (ekz. kun Mireille GROSJEAN pri ekzamenoj kaj azia agado) aŭ aliaj kunsidoj (ekz. kun Internacia Esperanto-Instituto) kun pliaj vizitoj de restintaj estraranoj en la

tagoj post la formala kunsidado. Aktive kontribuis al kelkaj sesioj Claude Nourmont, kiel reprezentanto de UEA. Aliaj gastoj estis Kristin TYTGAT (subvenciebuloj) kaj Rob MOERBEEK (graveco de normoj).

Tiom ŝtopita estis la programo, ke estraranoj kunvenis en la loĝejo por laboraj matenmanĝoj – ne nur kuba kunsido, sed eĉ kuna kubsido.

*Stefan MACGILL, 4 decembro 2009*

## **Kio nova por la ILEI-Konferenco en Kubo?**

### *Seminario*

Jam ILEI kaj la Amerika komisiono de UEA kunlabore kun TEJO organizas seminarion de Flugiloj de Interkultura Vento por lingva perfektigo, metodika trejnado kaj organiza spertiĝo de E-agantoj. La partoprenantoj spertiĝos ankaŭ pri la metodoj de interkultura edukado per Esperanto kaj lernos kiel apliki la projekton Interkulturo kaj utiligi ĝiajn faciligojn surterene. La seminario okazos samtempe kun la Konferenco ĉe la Hotelo Islazul Canimao en Matanzas, Kubo. Plejmulto de la partoprenantoj el Latinameriko kaj aliaj mondopartoj estos elektitaj per konkurso kaj ricevos subvencion, sed la seminario estos malfermita ankaŭ por aliaj konferencanoj. La ĉeforganizanto de la seminario Martin Schäffer planas ĝian daŭrigon dum Universala Kongreso de UEA en Havano, kiu tuj sekvos la konferencon de ILEI, kaj dum la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos la postan semajnon en Santa Cruz del Norte.

### *Ĝis tri semajnoj en Kubo!*

UEA baldaŭ anoncos specialajn flugofertojn de la flugkompanio Cubana, kiuj permesos al aliĝintoj de la UK restadi ĝis 21 tagojn en Kubo, por plene profiti la aranĝojn kaj ekskursojn, kiuj okazos sub la aŭspicio de ILEI, UEA kaj IJK.

### *Programo*

En Kubo, ni komencos ĉiun tagon per mallonga periodo de kunestado, por ke ni kune pli bone konatiĝu, ekhavu klaran ideon pri la tiutagaj prezentaĵoj kaj prezentontoj, kaj respondu organizajn kaj aliajn demandojn.



Ni variigos la daŭron de la programeroj. Ne nur la tipajn prelegojn (ekz. de 40 minutoj plus 20 minutoj por diskutado) ni havos, sed ankaŭ okazojn por pli longa interagado kaj por pli mallongaj prezentaĵoj. Tio donos la eblon al pli multaj konferencanoj fari eble 15-minutajn elpaŝojn kun 5 minutoj por diskutado, kaj eblos eĉ serio de 5-minutaj

prezentadoj, por kolegoj kiuj ne havis multe da instrua aŭ prezentada spertoj, sed tamen deziras komuniki unu specifan ideon aŭ ekzercon utilan por aliaj instruantoj. Krome, por ke ĉiu havu publikon kies ĉeesto kompenzos la preparadon, la plej kernaj programeroj ne konkurencos inter si.

Kion vi deziras prezenti kaj en kiu formato? Ni certe deziras trovi lokon por ĉio kio plej konvenos kaj interesos la ĉeestantojn. Seriozaj fakaj programeroj pri edukado kaj instruado nepre. Tamen ankaŭ tre praktikaj, kiuj utilos jam en via unua postkonferenca klaso! Forumoj, fakulaj diskutoj, lecionprezentadoj, laborgrupoj, simplaj okazoj por interbabilado pri instrutemoj. Lingva kliniko por respondi demandojn pri gramatiko kaj vortaro, kaj kiel plej bone instrui ilin. Antaŭe preparitaj skribitaj resumoj kaj dumkonferenca raportado por helpi al ĉiuj maksimume profiti la tutan programon. Ni atendos ankaŭ viajn ideojn!

Ne mankos ekskursoj kaj distra programo, al kiu vi estas tre kore invitita kontribui! Situanta en kulture kaj historie riĉa apudmara loko, Matanzas ne tro malproksimas por vizito de la fama banloko Varadero. Tamen, en la konferenca urbo mem vi vidos krom la rivero, haveno kaj maro interesan arkitekturon, belajn pontojn, katedralon, teatron, muzeon pri historio kaj la parkon de Libereco. Vokos ankaŭ por unikaj vizitoj la grotoj de Bellamar, kaj vesperoj en nokto-kluboj kiel la kabaredo "Tropicana Varadero", por ĝui unikajn kubajn spektaklojn.

### *Nia loĝejo*

La hotelo Canimao disponas pri 158 komfortaj ĉambroj klimatizitaj, ĉiuj kun privataj necesejo kaj duŝo,



radio kaj satelita televido, kun alekstera videblo; restoracio, kafeterio, trinkejo, nokta klubo, naĝejo, ludejo, masaĝ-ĉambro, reta servo, vendejo, monŝanĝejo, sekureca kaso centra, kunvenejo kaj parkejo. La konferenca oferto inkluzivas du manĝojn tage en la hotelo, ekskursojn (laŭplane tuttaga kaj duontaga), alvenon de la flughaveno kaj foriron, kun transporto al Havano ankaŭ al la UK. Fotoj de la konferenco estas afiŝitaj en nia retejo (vidu sub 'Konferencoj') kaj en la aldonita PDF-versio.

### *Faka, labora kaj distra*

Ĉiuj tri fadenoj kuniĝos en ekvilibro, tiel ke dum la semajno de la 11-a ĝis la 17-a de julio ĉiuj lernos, amuziĝos kaj ĝuos la kunestadon.


Ĉiutage ĉiuj konferencanoj havos eblon kunveni por unu komuna faka aranĝo, ekz. fakula diskuto, forumo, grup-laborado. La komitato kunsidos komence de la konferenco, aŭdos raportojn kaj starigos publikajn labor-grupojn. La komisiono pri universitata/scienca agado kaj la lerneja komisiono certe okazigos labor-rondojn, eventuale ankaŭ aliaj komisionoj (terminologio, ekzamenoj...) faros simile. Tie eblis aŭdi pri la faritaj laboroj, kurantaj projektoj kaj estontaj planoj kaj kontribui al mini-projekto elektita por kuna plenumo dum la konferencaj tagoj. Ni starigos (almenaŭ) unu dum-konferencan komisionon – pri komunikado – kun la tasko pretigi gazetarajn komunikojn pri la konferenco kaj por liveri poste tekstojn kaj fotojn al *IPR*, *Esperanto* kaj aliaj revuoj, radio-stacioj kaj hejmpaĝoj.

Fine de la semajno, la komitato kunsidos denove por aŭdi la rezultojn de la laborgrupoj kaj plani la sekvajn laborojn. Ni esperas prezenti ion pri instruista trejnado ne nur en la seminario, precipe inter kubaj aŭ latinamerikaj kolegoj. Ankaŭ ekzamensesio aranĝeblos, se anoncos sin kandidatoj. Se la kondiĉoj ebligos tion, ni planos laŭeble la jam tradician simpozion kun lokaj universitatoj.

La aliĝilo jam aperis en la retejo de ILEI ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info) kaj en la nuna numero de *IPR*, do jam vin anoncu! Ni elkore dankas nian Lokan Kongresan Komitaton, kies membroj inkluzivas nian estraron Julián HERNÁNDEZ, Marta Alonso GUTIÉRREZ, la landan sekciestron, Pedro FERNÁNDEZ, Gonzalo COLLANTES kaj Yoandra RODRÍGUEZ. Ne maltrafu neforgeseblan lernoriĝigan sperton en neforgesebla tropika paradiza etoso!

*Duncan CHARTERS, 5 decembro 2009*

# ALIĜILO por la 43a konferenco de ILEI – Matanzas 2010



Familia Nomo: \_\_\_\_\_

Cetera Nomo: \_\_\_\_\_

Lando: \_\_\_\_\_

Kodo, urbo: \_\_\_\_\_

Strato, n-ro: \_\_\_\_\_

Tel.: \_\_\_\_\_ Retadreso: \_\_\_\_\_

Naskiĝdato: \_\_\_\_\_. Profesio: \_\_\_\_\_

Mi estas:

- viro     membro     junulo  
 virino     ne-membro     handikapulo

Mi interesiĝas pri:

- instruistotrejna kurso  
 ILEI-ekzameno

Periodo	A-lande	Hoku ↓	B-lande	Hoku ↓
Ĝis 15 feb, 2010	€ 330		270	
Ĝis 15 majo, 2010	€ 400		350	
Poste	€ 490		450	

### **Forpreno:**

- ILEI membroj/junuloj: 15 EUR  
 Handikapuloj atestitaj: 25 EUR  
 Rezigno pri la ekskursoj: 25 EUR

### **Aldonoj:**

- Por unu-lita ĉambro: 90 EUR  
 Bankeda krompago: 20 EUR

Mi aldonas solidarecan donacon al Fondaĵo Dazzini, por helpi al kubaj aŭ latinamerikaj kolegoj partopreni la konferencon kaj trejnkurson: € \_\_\_\_\_

Entuta sumo pagenda en eŭroj: \_\_\_\_\_

Mi pagas ĉi tiun sumon al :

- konto ilek-a ĉe UEA kun indiko "ILEI-konferenco" (preferata vojo)  
 bankokonto sveda ILEI: En Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

Kubanoj kaj latinamerikanoj bv. preni kontakton kun LKK pri ebloj pagi per maleŭropaj vojoj.

Mi deziras dividi ĉambron kun: \_\_\_\_\_

Mi petas vegetarajn manĝojn:  jes  ne.

Pleje interesas min la sekva(j) programparto(j) (vi rajtas elekti pli ol unu):

faka                       labora                       distra/ekskursa

Mi proponas la jenan fakan prelegon aŭ prezentaĵon:

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Mi povas kontribui alimaniere, nome:

\_\_\_\_\_

En la labora programo, plej interesas min laborgrupo pri:

universitata agado                       komunikado                       lerneja agado

pedagogia terminologio                       alia: \_\_\_\_\_

Pri ajna temo (dieta, programo, alireblo...), mi havas jenan apartan bezonon aŭ peton:

\_\_\_\_\_

### **Invitilo**

Bonvolu sendi al mi invitilon.

Pasportnumero: \_\_\_\_\_ Eldonlando: \_\_\_\_\_ Valida ĝis \_\_\_\_\_.

### **Subskribo:** (bv. hoki ĉiujn!)

Mi legis, komprenis kaj akceptas la aliĝkondiĉojn.

Mi akceptas, ke mia nomo aperu en listo de aliĝintoj en la reto kaj ke mia nomo, ret-adreso kaj telefon-numero aperu en la listo de partoprenantoj.

Mi komprenas ke mi devas komuniki mian precizan flugo-numeron kaj alvenhoron por ke la transportservo renkontu min je alveno.

Loko, dato: \_\_\_\_\_ Subskribo: \_\_\_\_\_

Prefere aligu vin rete per plenskribo de la aliĝilo en la hejmpaĝo (www.ilei.info). Se vi plenskribas la PDF version (komputile plenskribeblan), sendu ĝin ret-mesaĝe al nia kasisto ĉe <persiko@mail.ru>.

Se tamen paperan aliĝilon vi devas sendi, bonvolu adresi ĝin al:

Sekretario ILEI, p/a Esperanto-Centro, Grubenhagenstr 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio.



## Aliĝkondiĉoj de la Konferenco

La baza aliĝkondizio dependas de la landokategorio kaj aliĝdato de la aliĝanto. Estas du landokategorioj:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B. Iamaj socialismaj landoj de la orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Afriko, Latinameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.).

Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco. Junulo estas konsiderata tiu, kiu naskiĝis post la 31a de dec. 1979 kaj sendas al ILEI atestilon pri la aĝo. La rabato por handikapuloj bezonas atestilon.

La aliĝkondizio ne inkluzivas ajnan asekuron.

Kotizoj estos repagitaj je 70% ĝis februaro 15 kaj 30% ĝis majo 15. Post tiu dato ne povas okazi repago, sed pagita kotizo estas transigebla al alia persono.



*Mireille GROSJEAN (la dua de dekstre) kun ILEI-estraranoj en Nederlando*

*Fotoj titolpaĝe – supre: REF-anoj dum ekskurso en Subotica (foto de Ognjen Petrović); malsupre: ILEI-estraranoj dum la Malferma Tago (de maldekstre): Stefan MACGILL, Zsófia KÓRÓDY, Małgosia KOMARNICKA, Julija BATRAKOVA, Duncan CHARTERS (foto de Katalin Kováts).*

### Redakciaj informoj

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem. Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00. Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, <r.moerbeek@wanadoo.nl>*.*

**La nunan numeron ni sendis al la presejo 7 decembro 2009, redaktofino por la sekva numero 15 januaro 2010.**

---

## Laborkomisionoj

---

**Ekzamena:** Mireille Grosjean (prezidanto), Mónica Molnár (vicprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu  
**Elekta:** Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute  
**Kontrolo:** Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman  
**Lerneja:** Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Julián Hernández, Tiekō Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi  
**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas  
**Terminara:** Maŭro La Torre, Miroslav Malovec, Ilona Koutny  
**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Aida Ĉiĝikaitė, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat

---

## Kunlaborantaj institucioj

---

**EEU:** *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärsvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)  
**E@I** (*Esperanto ĉe Interreto*, [www.ikso.net](http://www.ikso.net)): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).  
**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*):  
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, [esperanto@Education.monash.edu.au](mailto:esperanto@Education.monash.edu.au)  
**IEI:** *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.  
**TEJO:** Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (<http://www.tejo.org/>).  
**UEA:** *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**  
**UNESKO** (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, *quai de la Loire*, FR-75019 Paris, [francois.lojacomo@wanadoo.fr](mailto:francois.lojacomo@wanadoo.fr); **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux*, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@tiscali.fr](mailto:monique.arnaud@tiscali.fr); **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20, pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)

---

## Membreco kaj pagado por aliaj servoj

---

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B) (validaj ĝis dec 31, 2009. Ekde la 1-a de januaro 2010 la reta membreco estos 8 EUR por la A-landoj kaj 4 EUR por la B-landoj). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al: **Sjoerd Bosga**, Tvärpilsgratan 14, SE - 723 53 Västerås, *Svedio*, [sjoerd@esperanto.se](mailto:sjoerd@esperanto.se).

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

\* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

\* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningsbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

\* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.



*La inaŭguro de la Lerneja Komplekso Anna Paolizzi en Kinshasa (vd p.18)*



*Seminario de ILEI-Ĉinio okazis en la Lushan-Montaro (vd p.16)*



La publiko de la Malferma Tago de UEA (foto de Katalin KOVÁTS).



*De maldekstre:* ILEI-estraranoj Julija BATRAKOVA, Duncan CHARTERS, Stefan MACGILL, Małgosia KOMARNICKA, Zsófia KÓRÓDY kaj Radojica PETROVIC kun estrara komisiito por la Kuba konferenco Ana MONTESINOS DE GOMIS dum la estrarkunsido en Nederlando. La foto-loko estis ĝuste kuba restoracio kiu, laŭ la spirito de Hemingway, permesas al klientoj skribi salutojn sur la muroj – rimarku la verdan stelon super la kapo de Zsófia!